


Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-RO 579 (2) FEBRUARO 1954



Melbourne, de la suda riverbordo (*vidu paĝon 51*)

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.

Redaktoro : HANS JAKOB

Jara abono (1954) : 15 ŝil. anglaj (kun membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)

Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Ĉion por la redakcio sendu al
ESPERANTO

Palais Wilson, Genève, Svis.

Urgajn informojn sendu rekte
al Rickmansworth

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅓ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj

Eldonnumero 6000

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo



Enhavo

Specialaj Artikoloj :

paĝo

Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj : <i>Hans Jakob</i>	..	..	..	..	33
Esperanto en la Palaco de Nacioj : <i>Hans Jakob</i>	..	..	..	..	39
Kiam oni estas maljuna	..	..	..	..	40
Nederlando, hejmo de la individuismo : <i>Mason Stuttard</i>	..	..	..	..	43
Aŭstralio bonvenigas enmigrintojn : <i>Harold Holt</i>	..	..	..	..	51

Rakonto :

La Alvoko de la Konscienco : <i>Paul Heinrich</i>	..	..	..	..	57
---	----	----	----	----	----

Poezio :

Tri poĉemetoj : <i>Marjorie Boulton</i>	..	..	..	..	34
---	----	----	----	----	----

39a Universala Kongreso :

Oficiala Komunikado n-ro 4	..	..	..	..	42
----------------------------	----	----	----	----	----

Belartaj Konkursoj de UEA :

1953—Raporto de la Sekretario	..	..	..	..	45
1954—Deklama Branĉo (anonco)	..	..	..	..	34

Konstantaj Rubrikoj :

Centro de Esploro kaj Dokumentado	..	..	..	..	37
Enigma Konkurso	..	..	..	..	56
Esperantista Vivo	..	..	..	..	54
Internacia Konkurso	..	..	..	..	41
Nia Forumo	..	..	..	..	50
Oficiala Informilo	..	..	..	..	62
Radio kaj Esperanto	..	..	..	..	55
Tra la Libraro	..	..	..	..	47
Tra la Mondo Esperantista	..	..	..	..	35

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 579

Februaro 1954



Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj

KIEL kristnaska donaco aperis verko kun la supra titolo. Ĝin eldonis la Slovenia Esperanto-Ligo, kaj ĝi estas ero en serio da verkoj ankoraŭ aperontaj. Krom la kutima priparolo de tiu ĉi libro sub recenza rubriko, pli ol ordinara atento estas necesa pro ĝia karaktero. Plaĉe kaj serioze prezentita, *Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj* ne estas simpla geografia lernolibro sed ĝenerala priskribo kun geografiaj, etnografiaj, politikaj, ekonomiaj kaj historiaj elementoj, pasintaj kaj modernaj. Ĝi estas tendenca, donanta la vidpunkton jugoslavan, oficialan de la reganta reĝimo, en tio kio koncernas la okazaĵojn depost la kreo de jugoslavia ŝtato kaj la efektivigon de formo de socialismo. La libro estas antaŭ ĉio *informa* kaj en tiu ĉi senco ĝi tre bone plenumas sian rolon.

Estas antaŭvideble ke la apero de tiu ĉi libro kaŭzos kritikojn, tiom pro la enhavo kiom pri la uzo de nia lingvo. Je tio ĉi ni opinias utile doni nian principan vidpunkton, por eviti ĉian miskomprenon.

La rajto uzi nian lingvon por ĉiaj celoj estas ekster ia dubo. Pri tia uzo—ni diru “eksterneŭtrala” aŭ “neneŭtrala”—respondecas la uzanto. Vojgvidanta por ni, la nepolitika

Esperanto-movado, estas la “Bulonja deklaro”, kiu diras interalie :

Ĉar la aŭtoro de la lingvo Esperanto tuj en la komenco rifuzis unu fojon por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn kaj privilegiojn rilate tiun lingvon, tial Esperanto estas “nenies propraĵo”, nek en rilato materiala, nek en rilato morala.

Materiala mastro de tiu ĉi lingvo estas la tuta mondo, kaj ĉiu deziranto povas eldonadi en aŭ pri tiu ĉi lingvo ĉiajn verkojn kiajn li deziras, kaj uzadi la lingvon por ĉiaj eblaj celoj : kiel spiritaĵoj de tiu lingvo estas ĉiam rigardataj tiuj personoj, kiuj de la mondo esperantista estos konfesataj kiel la plej bonaj kaj plej talentaj verkistoj en tiu ĉi lingvo.

La jurfonto de UEA estas ĝia statuto kaj la baldaŭ kvindekjara tradicio, plie la sperto akirita pri *neŭtraleco*. Same deviga estas por ni la “Deklaro de la hom-rajtoj”, kiu esence kompletigas la statuton de nia Asocio.

Tiom pri la Esperantista flanko de tiu ĉi afero. Pri la enhavo de la verko certe estos tiuj, kiuj ne konsentos kun la verkintoj. Por ni la regadformo de ŝtato estas la afero propra de la koncerna popolo, se nur *ni* rajtas kaj povas agadi. Same la

Esperantistoj rajtas kaj de propra starpunkto devas eĉ defendi la ŝtaton al kiu ili apartenas. Amo al la hejmlando kaj al propra popolo ne identas kun ŝovinismo.

Jam aperis bela kolekto de tiaj tendencaj dokumentoj. Plejofte estis ŝtatoficiala instanco kiu eldonis ilin, helpata de Esperantistoj kiuj do servis kiel perantoj. Estus konsilinde, ke en tiaj okazoj oni daŭrigu tiun ĉi saĝan proceduron, kiu lasas nin sendependaj.

Hans Jakob.

Belartaj Konkursoj 1954

Deklama Branĉo

Partoprenantoj en la Universala Kongreso en Haarlem rajtas anonci sin ĉe la kongreso mem al la Deklama Branĉo. La elektitaj tekstoj (kompletaj verkoj aŭ ĉerpoj) povas esti pecoj de poezio aŭ prozo, inkl. dramon, laŭ la plaĉo de la konkursanto, tamen kun tempobaro de 10 minutoj.

Provdeklamado okazos dum aparta kunveno de la speciala juĝa komisiono, kiu elektas tiujn konkursantojn, kiuj poste prezentos siajn deklamaĵojn en la kunsido de la Belarta Konkurso. La findecido pri premiado de tiu ĉi branĉo okazos dum tiu publika prezentado.

Samtempe ni memorigas la konkursantojn de la literaturaj branĉoj, ke la limtempo por tiu ĉi sekcio estas la 31a de marto, 1954. La limtempo por la Grafika Sekcio estas la 15a de junio, 1954 (detalaj kondiĉoj en la oktobra numero, 1953, p. 286).

D-ro F. Szilágyi,
Sekretario.

TRI POEMETOJ

Marjorie Boulton

Mistero de Amo

Mi volis preni ruĝan rozon,
Deziris ĝin—infera forno !
Mi tuŝis, kaj venena dorno
Montris la floran furiozon.

La neprenebla rozo restis.
Mi preskaŭ ploris pro doloro.
Kruela, trapikema floro !
La sango mian manon vestis.

Sed nun mi konas la ripozon
Per tiu sama sanginundo ;
Rigardu ! per la ruĝa vundo
Mi nun posedas mian rozon.

Vivu !

Mi ŝatus esti agrablo,
En vivdezerto
Rozo.
Ĉarma supozo !
Volo ne estas fakto.
Sed laŭ mia sperto
Estas pli bone kreski, kakto,
Ol kuŝi, nuda sablo.

Idento

Se iu frapas min per akcidento,
Protestas mi per tre kutima kri'
Kontraŭ malgrava doloreta sento :
“Bonvolu zorgi ! Tio estas mi !”

Tiu esprimas iom pripensigas
Min nun. Ĉu eble la dolorosento
Estas necesa, nin al vivo ligas—?
Jes—“tio estas mi !”—kaj jen idento.



Tra la Mondo Esperantista



Aŭstralio

Sinjoro Hugh Gibson, direktoro de la Interregistara Komitato por Eŭropa Migrado, verkis por la Esperanta gazetaro artikolon, kiu pritraktas la laboron de tiu Komitato en la plifaciligo de migrado eleŭropa. Ĝi donas klaran bildon de la grava troloĝateco en multaj eŭropaj landoj, kaj montras, ke la fortoj kaj lerteco de tiuj "troaj" homoj, kiuj ofte ne trovas sufiĉan laboron por bone vivi, estas nepre bezonataj en la "novaj" landoj.

* * *

La 1an de septembro aperis en la ĵurnalo *Brisbane Telegraph* anonco pri elekto de nova estraro de la Brisbana Esperanto-Societo. Tuj post la eldoniĝo la nova prezidanto, S-ro S. L. Parry, ricevis peton de radio-stacio 4BC por intervjuo, kaj la 3an de septembro la radio-stacio dufoje, matene kaj vespere, dissendis intervjuon pri la movado en Aŭstralio kaj eksterlande. Rezultis multaj pri-Esperantaj enketoj kaj pro tiuj oni esperas plivigligon de la movado en tiu regiono.

Britujo

Ĉiujare la junularo de Kimrujo sendas Radio Pac-mesaĝon al la infanoj de la mondo, okaze de la datreveno de la oficiala Pac-konferenco en Hago en 1899. La 18an de majo 1954 la BBC (el Cardiff) elsendos la Pac-mesaĝon en sep lingvoj, inter ili Esperanto. La

elsendo okazos je la 16a horo, je ondlongo 341m. Broŝuron kun detaloj pri respondoj ricevataj kaj aliaj stacioj kiuj faras tian programon oni povas ricevi de Pastro Gwilym Davies, C.B.E., M.A., Temple of Peace, Cardiff, S. Wales, Britujo.

Danlando

"Danish Outlook", duon-oficiala gazeto dana, eldonata en la angla lingvo, presigis bonegan artikolon pri-kaj por-Esperantan. La artikolon verkis J. Stig Hansen, kiu priskribas propran sperton pri lingvomalfacilaĵoj en turismaj kaj aliaj aferoj, kaj diras ke li trovis en Esperanto la solvon.

Francujo

De junio 26a ĝis julio 4a, 1954, okazos en Lyon la XIV Internacia Kongreso de Eks-studentoj de la Supera Komerca Instruado. Pli ol ducent asocioj en la tuta mondo sendos delegitojn al tiu Kongreso, kiu celas organizi la kunlaboradon de eks-studentoj de supera komerca instruado sur praktikaj fundamentoj.

Ĉar ĉi tiun jaron la Kongreso diskutos la problemon de la Internacia Lingvo estas dezirinde, ke multaj Esperantistoj partoprenu la kongreson, kondiĉe ke ili mem estu eks-studentoj de iu supera komerca lernejo.

Interesatoj bonvolu tuj skribi al S-ro Richard Levin, Président de l'Association des Anciens Elèves de l'Ecole Supérieure de Commerce de Lyon, 34 rue de la Charité, Lyon,

Francujo, indikante en kiu supera komerca lernejo ili studis, dum kiu tempo ili studis, kaj kiun diplomon ili gajnis.

Italujo

La 26a Nacia Kongreso de la Italaj Esperantistoj okazos en la Sardinia Insulo, en Sassari, de la 24a ĝis la 29a de aŭgusto 1954. La dato estas elektita tia por ke ĝi permesu, la 29an de aŭgusto, vidi la faman "Sardinian Rajdadon" en Nuoro. Post la 29a okazos postkongresaj ekskursoj al la Insulo Caprera (Garibaldi-ins.) kaj aliaj allogaj folklorplenaj lokoj. Tiuj kiuj intencas partopreni (alilandanoj ne pagas ian kongres-kotizon) estas petataj skribi al la Loka Komitato, Prof. Martellotta, Casella Postale 58, Sassari (Sardegna), Italujo.

Meksikio

En la IV Meksikia Kongreso de Sociologio, dediĉita al la sociologio de la edukado, kiu okazis de la 7a ĝis la 11a de decembro 1953 kun pli ol 150 partoprenantoj, ĉeestis inter aliaj organizaĵoj ankaŭ la Esperanto-Meksika Asocio, pere de sia delegito, Lic-to Tibor Sekelj, vojaĝanta komitatano de UEA, kiu nuntempe agadas en Meksikio.

La reprezentanto de la Esperantomovado en tiu grava kongreso prezentis tezon pri la "Graveco de la Internacia Lingvo en la edukado por pli bona mondo". En tiu tezo li elmontris el sociologa vidpunkto la du samtempajn direktojn de la moderna edukado: unue, la valorigon de la propra, nacia kulturo de ĉiu popolo, kaj due, la kreadon de universala kulturo, surbaze de reciproka estimo de la popoloj, prenante de ĉies kulturo ĝiajn bonajn elementojn. Ankaŭ li difinis la "homaranismon" vidalvide al la mal-

nova "humanismo", dirante, ke tiu ĉi klopodis altrudi al la mondo difinitan kulturon, nuligante la individuajn valorojn; dum la homarismo klopodas krei internacian kulturon surbaze de komprenemo kaj rekono de egalvaloro de ĉiuj pozitivaj fortoj de la homaro.

La tezo estis diskutita en la Tria Sekcio de la Kongreso, kiu alprenis decidon favoran al Esperanto. Tamen en la fina ĝenerala kunveno oni malaprobis tiun decidon . . . pro manko de tempo denove diskuti ĝin !


Nederlando

La Nederlanda Sindikata Konfederacio eldonis sian 23an bultenon ankaŭ en Esperanto. Ĝi estas belaspekta broŝuro kun detaloj de la sindikatoj kaj pri laboristaj aferoj ĝenerale. Instigu ankaŭ al viaj sindikatoj, ke ili sekvu tiun iniciaton. Adreso de la eldonintoj: N.V.V., P.C.Hoofstraat 174-180, Amsterdam, Nederlando.

Svislando

En Zürich ekestis komence de 1952 la bona ideo, organizi en popolaj altlernejoj de diversaj landoj samtempe koordinitajn Esperanto-kursojn (kiuj laboras pli-malpli laŭ sama instruplano), kies anojn la instruistoj jam dum la kurso rekte kontaktigu por ebligi al ili korespondadon. Tiun ideon havis D-rino Tina Peter-Ruetschi, kiu ĝis tiam eĉ ne scipovis Esperanton kaj nur lernis ĝin en la kurso, kies efektivigo estis ŝia propra merito. En aŭtuno komenciĝis la unua koordinita kurso, en kiu partoprenis dekduo da lernejoj en diversaj landoj. Ĝi estis tia sukceso, ke la afero konsiderinde kreskis, ĉar jam anonciĝis pli da lernejoj, ol la organizo, kiu ne fariĝu mamuta, povis akcepti.

fino sur paĝo 41



Centro de Esploro kaj Dokumentado
300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

Esperanto-Ekspozicio en Montevideo

Okaze de la Oka Sesio de la Ĝenerala Konferenco de UNESKO en Montevideo (de la 14-a de Oktobro ĝis la 13-a de Novembro 1954) CED aranĝos, en kunlaboro kun la Urugvaja Esperanto-Societo, grandegan Esperanto-ekspozicion. Ĝia celo estas prezenti en taŭga formo ĉiujn atingaĵojn de Esperanto en la 66 jaroj de ĝia ekzistado.

CED jam ellaboris la planon de la ekspozicio kaj per speciala cirkulero petis ĉiujn landajn asociojn, ĉiujn internaciajn Esperanto-organizaĵojn, la Esperanto-eldonejojn kaj la redakciojn de Esperanto-gazetoj sendi al Montevideo ĉiujn siajn eldonaĵojn. La unua, kiu respondis al tiu ĉi alvoko, estis la eldonejo "Heroldo de Esperanto" (Teo Jung), kiu jam forsendis grandan pakaĵon al Montevideo. Sekvis pluraj aliaj, tiel ke jam estas sendita al Montevideo abunda materialo.

Pro la fakto, ke la ekspozicio devas prezenti ne nur ĉiujn publikaĵojn, kiuj nun estas haveblaj en Esperanto, sed ankaŭ ĉion, kio estis publikigita kaj kreita en la pasinteco, CED turnas sin per tiu ĉi alvoko al ĉiuj esperantistoj en la mondo sendi ekspozician materialon al Montevideo. CED petas pri la sendo precipe de jena materialo:

(1) Ŝlosiloj ne plu haveblaj, (2) nacilingvaj lernolibroj kaj vortaroj, kiuj nun ne plu estas vendataj, (3) nacilingvaj tradukoj de la verkoj de

Zamenhof, (4) fakaj vortaroj kaj terminaroj, (5) beletristikaj verkoj (tradukoj kaj originaloj) ne plu haveblaj (precipe ĉiuj eldonoj de *Literatura Mondo*), (6) nacilingvaj tradukoj de Esperantaj originalaj verkoj aŭ el-Esperantaj tradukoj (precipe verkoj tradukitaj en la ĉinan kaj japanan el Esperanto), (7) nacilingvaj sciencaj, fakaj kaj aliaj verkoj kun Esperantlingvaj resumoj, aŭ specialaj eldonoj de tiaj Esperantlingvaj resumoj, (8) kompletoj de gazetoj kaj revuoj, nun ne plu aperantaj, (9) nacilingvaj revuoj kun Esperantaj rubrikoj aŭ resumoj, (10) turismaj gvidlibroj, prospektoj de diversaj urboj kaj entreprenoj, afiŝoj, flugfolioj k.t.p., en kiuj estas uzata Esperanto, (11) nacilingvaj verkoj, broŝuroj, studoj pri Esperanto (sendante kian ajn nacilingvan materialon pri Esperanto *nepre indiku* la lingvon, ĉar tiu materialo estos klasita laŭ la lingvo).

La ekspozicio en Montevideo devas fariĝi impona elmontro de ĉio, kio estas kreita en Esperanto kaj pere de ĝi. La ekspozicio devas montri la kulturan valoron de la Internacia Lingvo, ĝian socian signifon kaj speciale ĝian interfratigan rolon. Konsiderante la celon de la ekspozicio, la organizantoj opinias, ke ĝi devas aŭ esti vere impona, aŭ tute ne okazi. Helpu, ke ĝi estu impona!

La materialon por la ekspozicio oni bonvolu sendi kiom eble plej baldaŭ

al la adreso :

**S-ro Rodolfo García,
Calle Yaguarón 1397,
Montevideo, Urugvajo.**

Estas konsilinde fari, se iel eble, *liston* de la sendita materialo en tri kopioj : unu konservu la sendinto, la alian oni aldonu al la pakaĵo, la trian oni sendu al CED. En ĉiuj aferoj koncerne la ekspozicion bonvolu *rekte rilati* kun S-ro Rodolfo García kiu, kune kun Prof. Fernández Menéndez kaj kun la aliaj lokaj esperantistoj, prizorgas la kolektadon de la materialo kaj la aranĝon de la ekspozicio.

CED speciale atentigas, ke la materialo estos zorge konservita, por ke ĝi ĉiam troviĝu je dispono por aranĝado de similaj ekspozicioj en la lokoj, en kiuj tio montriĝos necesa.

Kiuj landoj finance kontribuas al CED ?

De la 1-a de Aŭgusto 1952 ĝis la 31-a de Decembro 1953, do dum 17 monatoj, CED ricevis donace entute £227-1-7. Ni regule publikigis la nomojn de ĉiuj donacintoj en nia revuo. Jen nun la dispartigo de tiu sumo laŭ la landoj : Britujo £41-15-0, Svedujo £36-2-10, Maroko £30, Francujo £29-19-0, Germanujo £20-7-6, Belgujo £10-7-0, Usono £8-18-8, Svislando £8-16-0, Danlando £8-5-0, Italujo £7-8-6, Novzelando £5-10-0, Finnlando £5, Sudafriko £5, Norvegujo £3-15-11, Hispanujo £2, Madejro £1-14-0, Nederlando £1-9-6, Aŭstrio £0-12-6, entute 18 landoj £227-1-7.

CED tutkore dankas al ĉiuj donacintoj, sed tute speciale al la Britaj geesperantistoj, kiuj, same kiel en la pasinta jaro, plej multe

kontribuis por la celoj de CED. Same tiel specialan dankon al la Sveda Esperanto-Federacio, kiu organizis la kolektadon de donacoj inter sia membraro. Apartan mencion meritas la tri plej altaj individuaj kontribuoj en tiu ĉi periodo : tiu de S-ro C. Thollet el Maroko (£30), tiu de S-ro R. Llech-Walter el Francujo (£20) kaj tiu de Prof. H. Rissom el Germanujo (£18-6-6).

La laboro de CED dependas de la financa helpo, kiun donas al ĝi la Esperantistaro. Tiu helpo ne nur ebligas la funkciadon de tiu ĉi nia gravega institucio, sed ankaŭ signifas kuraĝigon por la kunlaborantoj, kiuj sindone alportas multege da laboro, energio kaj kapablo por sukcesa plenumo de la taskoj de CED. En tiu ĉi decida jaro CED espereble havos ankoraŭ pli ampleksan subtenon de ĉiuj esperantistoj ne nur el la landoj supre menciitaj, sed ankaŭ el tiuj, kiuj ĝis nun nenion kontribuis.

Donacoj al CED

	£	ŝ.	p.
Stato la 4-an de Decembro 1953	215	15	1
E.C.S., Britujo (dua donaco) ..	3	0	0
S-ro P. Turner, Usono ..	2	0	0
S-ro E. G. Dodge, Usono (dua donaco)	1	15	0
S-ro T. P. Termaat, Nederlando		4	6
D-ro J. P. Humberst, Svislando		6	0
S-ro E. Stjörnesund, Norvegujo		5	0
Inĝ. H. Amaral, Madejro ..	1	14	0
Prof. I. Lapenna, Britujo (dua donaco)	2	2	0
Stato la 31-an de Dec. 1953 ..	£227	1	7

Al ĉiuj donacintoj koran dankon. Donacojn por CED oni povas sendi al UEA, Rickmansworth (Herts.), Britujo, aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34 Rue de Chabrol, Paris X, aŭ al la CED mem.

Esperanto en la Palaco de Nacioj

Por la unua fojo Esperanto publike parolata en la Palaco de Nacioj, la Eŭropa sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj en Ĝenevo

LA veno en Ĝenevon de Sinjoro Ralph Harry, Ĝeneralkonsulo de Aŭstralio kaj Konstanta Delegito ĉe la Eŭropa Sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj, donis novan impulson al nia afero en tiu-ĉi urbo. Dank' al lia iniciato okazis informa prezento de kolor-sonfilmo *Aŭstralio Hodiaŭ*, klarigata en Esperanto, la 18an de decembro 1953, en la Palaco de Nacioj.

Invititaj estis la personaro de la Sidejo kaj aro da konataj Esperantistoj. La programo de tiu ĉi prezentado estis la jena :

Enkondukaj vortoj de la Direktoro de la UNO-Sidejo, *Sinjoro A. Pelt* ;

Prelego de la Ĝeneralkonsulo de Aŭstralio, *Sinjoro Ralph Harry*, pri la celo de la filmo ;

Parolado de *D-ro Edmond Privat*, pri la uzo de Esperanto en internaciaj konferencoj, kaj *Sinjoro Hans Jakob* pri la filmo kaj la praktika uzado de Esperanto.

La invito je tiu-ĉi manifestacio estis farita de la UNO-sidejo mem kaj la filmo estis prezentita en la kino-salono de la Palaco. Ĉeestis ĉ.100 personoj, kiuj interese sekvis la parolojn de la oratoroj, kiuj vice evoluis la programon en franca, angla kaj en Esperanto.

Tiu-ĉi manifestacio estas bona



De maldekstro al dekstro : S-ro Alfred Rehman, Delegito de UEA en Ĝenevo ; S-ro Hans Jakob, Estrarano de UEA ; S-ro Ralph Harry, Ĝeneralkonsulo de Aŭstralio en Ĝenevo kaj Konstanta Delegito ĉe UNO-sidejo eŭropa ; D-ro Edmond Privat, Profesoro ĉe Universitato de Neuchatel ; S-ro Adrian Pelt, Direktoro de la Eŭropa Sidejo de la Unuiĝintaj Nacioj.

aŭguro por la diskutado pri nia afero en la UNESKO-konferenco 1954, Montevideo.

Konvenas diri kelkajn vortojn pri la filmo mem. Ĝi havas la celon diskonigi Aŭstralion kaj kuraĝigi energiprovizitajn eŭropanojn enmigri kaj krei al si novan hejmon. Estas konata, kiom faris la Aŭstralia Federacio (*The Commonwealth of Australia*) por ebligi al ekzilitoj kaj rifugiintoj eŭropaj enmigri tiun ĉi terparton, la kontinenton de la estonto.

La klarigon pri la filmo (en Esperanto) plenumis samideano usona, Sinjoro G. A. Connor, New York. Dum duonhoru sekvis bildoj prenitaj el la naturo, kreskaĵoj mirigaj kaj mirindaj, floroj eksterordinaraj kaj same eksterordinara la bestaro. Grenkampoj kaj siloj, sukerkanplantejoj, ŝafaroj kaj ŝaftondado, fiŝkaptado, minejoj, ŝtaluzinoj, por nur citi la plej konatajn aktivecojn de la Aŭstralianoj. Bildoj de la ĉefaj urboj, de la eduk-institucioj, universitatoj, dokumentas pri la alta kultura nivelo de la kvina kontinento. Laste aperis la ĉefurbo Canbera, laŭplane kreita sidejo de la federacio de la Aŭstraliaj Ŝtatoj. Resume: belega dokumento pri la temo, bonega ideo ĝin akompani per klarigo en Esperanto.

Al Sinjoro Ralph Harry, iniciatinto, aktiva Esperantisto, ni povas diri plenvoĉe: Gratulon kaj sinceran dankon!

Hans Jakob.

Aŭstralio hodiaŭ. Esperantistaj societoj kiuj deziras prezenti tiun ĉi sonfilmon povas ricevi utilajn informojn en propra lando ĉe la plej proksima reprezentanto de Aŭstralio, legacio aŭ konsulejo. Ĉi-tiu siavice faros la neceson.

Kiam oni estas maljuna

Nuntempe la homoj vivas multe pli longe ol antaŭ 100 jaroj. Vivkondiĉoj estas pli bonaj; la sciencoj de nutrado kaj kuracado multe progresis. Tamen la pli longa vivo kaŭzas problemojn, kaj unu el la plej grandaj estas kiel vivi, kiam oni maljuniĝos?

La problemo havas du flankojn—korpan kaj mensan, el kiuj la pli grava estas la mensa. Oni devas lerni venki la plej minacan malamikon—la Timon. Trovu bonan kuraciston, konsultu lin regule, obeu kaj fidu lin. Manĝu, trinku kaj fumu modere.

Ekkomprenu, ke korpaj talentoj nature malpliĝos. Do frue en la vivo, kulturu mensajn provizojn. Kredu, ke la nombro de jaroj ne gravas—nur la spirita aĝo. Ne vivu en la pasinteco. Memoru tion, kio estas agrabla, sed ne bedaŭru ĝin. Serĉu ĉion, kio povas kontentigi vin nun, belaĵojn en la naturo, muzikon, librojn. Ĝuu tion, kion vi nun havas. Ne sopiru tion, kio jam forpasis. Rideti estas bone, ĉar ĝi malstreĉas la muskolojn kaj mensan streĉon, do gravas la espero kaj kontento por feliĉa maljuneco. Dubo, malespero, timo estas signoj de maljuneco *mensa*, kaj la menso ne maljuniĝos se vi konservos ĝin vigla kaj viva. Plenigu la menson per la plej bonaj pensoj de la pasinteco kaj havu daŭran intereson en tio, kio estas inda en la nuntempo.

Oni povas esti same bela, kiam oni estas maljuna kiel dum junaĝo. Rigardu la bildojn de Rembrandt, kiu vidis la belecon de la maljuna vizaĝo.

Fine, jen kelkaj vortoj, kiuj povas servi kiel devizo: Rigardu supren, ne malsupren; antaŭen, ne malantaŭen; eksteren, ne internen.

La Internacia Konkurso

MONTRIĜIS en 1953 pli da intereso pri la Internacia Konkurso ol iam antaŭe, kaj la rezulto ĝenerale estis tre kontentiga. Jen la ciferoj je la fino de la jaro . . .

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Argentino ..	500	960	192.0
2. Italujo ..	2400	2945	122.7
3. Maroko ..	600	730	121.7
4. Germanujo ..	3200	3625	113.2
5. Norvegujo ..	2100	2372	113.0
6. Aŭstralio ..	900	1010	112.2
7. Francujo ..	5200	5809	111.7
8. Aŭstrujo ..	800	880	110.0
9. Sudafriko ..	300	330	110.0
10. Jugoslavujo ..	1500	1643	109.5
11. Svedujo ..	5500	5972	108.6
12. Hispanujo ..	1500	1616	107.7
13. Belgujo ..	2200	2342	106.5
14. Svislando ..	1450	1530	105.5
15. Usono ..	2300	2416	105.5
16. Nederlando ..	4600	4704	102.2
17. Brazilo ..	6500	6525	100.4
18. Danlando ..	2500	2470	98.8
19. Japanujo ..	900	870	96.6
20. Urugvajo ..	250	240	96.0
21. Britujo ..	10000	9485	94.9
22. Finnlando ..	2200	2065	93.9
23. Novzelando ..	900	836	92.9
24. Kanado ..	300	250	83.8
25. Kubo ..	250	205	82.0
26. Islando ..	450	370	80.2
27. Portugalujo ..	600	480	80.0
28. Irlando ..	250	185	74.0

Argentino okupas la unuan lokon kaj ricevos premion £10 kaj diplomon, kaj ĉiu delegito en tiu lando ricevos libropremion. Gratulon ! En la dua vico troviĝas Italujo, kiu montras tre bonan progreson, kaj denove ni gratulas al Maroko, kiu ĉiam estas en la unuaj tri landoj, malgraŭ pli-altiĝintaj kvotoj.

* * *

Simila konkurso okazos en 1954, kaj la aljuĝo de poentoj estos kiel antaŭe : AM 1 ; MJ 5 ; MA 10 ; MS 15 ; Patrono 50 ; Nova dumviva membro 50.

La Landa Asocio en la lando kiu plej bone sukcesos, ricevos premion £10 kaj diplomon, kaj ĉiu delegito en tiu lando ricevos libropremion. Jen la kvotoj por 1954 :—

Argentino ..	950	Japanujo ..	900
Aŭstralio ..	1000	Jugoslavujo ..	1600
Aŭstrujo ..	850	Kanado ..	250
Belgujo ..	2300	Kubo ..	250
Brazilo ..	6400	Maroko ..	700
Britujo ..	9500	Nederlando ..	4600
Danlando ..	2500	Norvegujo ..	2300
Finnlando ..	2000	Novzelando ..	850
Francujo ..	5600	Portugalujo ..	500
Germanujo ..	3600	Sud-Afriko ..	300
Hispanujo ..	1600	Svedujo ..	5900
Irlando ..	250	Svislando ..	1500
Islando ..	350	Urugvajo ..	250
Italujo ..	2900	Usono ..	2300
Izraelo ..	250	Venezuelo ..	250

Pro la kreskanta intereso pri nia lingvo en la mondo, kaj la plivigliĝo de la movado en multaj landoj, estos tre interese vidi kion montros la konkurso en la nuna jaro. Ju pli da progreso en ĉiu lando, des pli da kresko por la movado internacia. Ĉiu faru sian eblon, ke ni montru ĝis Montevideo ke nia movado ne stagnas sed brile kreskas !

C.C.G.

Tra la mondo : de paĝo 36

En novembro 1953 komenciĝis la dua serio, en kiu partoprenas lernejoj en jenaj lokoj : Bruxelles, Antwerpen, Kopenhago, Stuttgart, Bonn, Manchester, Birmingham, Isle of Wight, Helsinki, Alès, Angers, Bordeaux, Montpellier, Paris, Perpignan, Den Haag, Haarlem, Rotterdam, Firenze, Linz, Salzburg, Karlstad, Zürich, kaj Bern. En la popolaltlernejo de Zürich la kurso havas 44 partoprenantojn kaj en tiu de Bern, 32. La centro de la aranĝo estas Zürich.



39-a Universala Kongreso de Esperanto

Poŝtfako 140, Haarlem, Nederlando

31-an julion—7-a aŭguston 1954

N-ro 4

OFICIALA KOMUNIKO

Januaro 1954

Pagoj : Rotterdamsche Bank, Haarlem. Poŝtgirkonto 604997.

Grave : La L.K.K. akceptas nur pagilojn ŝanĝeblajn en banko k.s. Ĝi absolute ne akceptas librojn aŭ varojn.

Multaj personoj ankoraŭ sendas aliĝilojn al Haarlem kaj pagojn al perantoj. L.K.K. petas, ke oni sendu aliĝilon kaj pagon al la sama instanco, ĉu al Haarlem, ĉu al peranto.

Multaj personoj pagis sen aliĝilo. Sen detaloj ne eblas enskribi la aliĝon. Se oni ne havas aliĝilon petu tion de landa asocio.

Dua Bulteno : La Dua Bulteno estas en la presejo kaj atingos ĉiujn aliĝintojn en januaro. Kun ĝi estos la oficialaj Mendiloj por loĝejoj kaj ekskursoj. L.K.K. akceptos mendojn nur per tiuj dokumentoj, kiuj formas parton de la arkiva sistemo. Sekve, ne mendu per letero aŭ poŝtkarto.

Fakaj asocioj : La L.K.K. disponigos senpage salonojn al “kunlaborantaj fakaj asocioj” (de U.E.A.). Aliaj asocioj devos pagi. Asocioj dezirantaj salonojn por fakaj kunsidoj kiel eble plej baldaŭ komuniku tion al L.K.K. kun indiko pri la atendata nombro, kiu ĉeestos. La Oficiala Programo estas en preparo. Post aprobo de U.E.A. ŝanĝoj kaj aldonoj estos fareblaj nur post novaj konsultoj kun la Estraro.

Karavanaj aranĝoj : La L.K.K. avertas, ke ĝi neniel helpas al aŭ

kunlaboros kun privataj aranĝantoj de karavanoj, kiuj memstare agas. Al tiaj aranĝantoj la L.K.K. povas, laŭ la Kongresa Regularo, rifuzialiĝon.

Sveda Esperanto-Federacio informis, ke ĝi rajtigis aranĝi karavanon al Haarlem : Ungdomens Resebyra, Jungfrugatan 30, STOCKHOLM O, pere de S-ro K. E. Karlsson.

Kotizoj : Multa konfuzo ekzistas pri la kotizoj de edzinoj. Jen ekzemploj (por la dua periodo) :
Edzo (kaj ĉiu plenkreska

homo)	guld. 22.—
Edzino	„ 11.—
Edzo (membro de U.E.A.) ..	„ 19.50
Edzino de membro	„ 9.75

La limo de partopreno en la kongreso estas 2,000 personoj. Post atingo de tiu cifero L.K.K. rifuzos pliajn aliĝojn. Cetere ankaŭ post la 30-a de junio aliĝo estos neebla.

Statistiko : (ĝis fino de 1953) :
Aŭstrio 6, Belgujo 30, Britujo 133, Brazilo 3, Danujo 20, Finnuko 17, Francujo 20, Germanujo 92, Hispanujo 3, Indonezio 1, Italujo 42, Japanujo 1, Jugoslavujo 50, Kanado 2, Kostariko 1, Nederlando 361, Norvegujo 37, Novzelandoj 9, Portugalujo 3, Svedujo 76, Svisujo 16, Turkujo 2, Usono 5. Sumo 930 el 23 landoj (pasintjare 458).

Mason Stuttard
Konstanta Kongresa Sekretario.

Mason Stuttard :

Nederlando, hejmo de la individuismo

FENOMENO de malgrandaj landoj ofte estas tio, ke densas ne nur la loĝantaro sed ankaŭ la impresoj je vizito. La rezulta orgio de emocio-stimuloj riskas lasi homon kun speco de spirita maldigesto, kaj des pli frape veras la aksiomo, ke ĝuonestas plie en la anticipa frando kaj posta rememoro, ol en la travivaĵo mem, kiu sekve de intenso de la sperto—simile al gustumado de iuj ekstraktoj—momente jam ne gustas.

Iagrade tiel estas pri Nederlando. En ĉiu momento trudiĝas al okulo observema impresoj de aferoj fremdaj kaj novaj, kiel ankaŭ de novaj facetoj de banalaĵoj konataj jam delonge. Interimplikiĝas en senfina diverso la familiara kaj la fremda en kolorplena mozaiko de vivo.

En la kamparo, la okulo—jam edukita de la indiĝena pentroarto—rigardas rekone al la serena vizaĝo de la malaltlanda pejzaĝo. Ĉi tie kaj tie la ebenon rompas vico de severmienaj arboj spitantaj la venton, kiu tiel ofte blovas trans la landon. Unuaranga ventbarilo estas tiuj arboj dorlotante la parcelojn sube kuŝantajn. Turo pintas el dometoj ariĝintaj ĉirkaŭ la vilaĝa preĝejo kiel idoj sub la protektaflugilo de korta birdo. Aŭto ruliĝas sur ŝoseo alte super la tegmentoj de farmodomoj, sur la iama digo, kiu siatempe ŝirmis la kampojn kontraŭ la erozia furiozo de la ondoj. La terenon disdividas reto de kanaloj kaj akvovojoj, rektangulaj arĝento-bluj strioj tra la verdaj paŝtejoj, kie grasaj blanka-nigraj frisaj bovinoj kontente maĉadas. Kaj super ĉio staras kun brakoj distenditaj la ventmuelilo benante la fekundon de la riĉa vivo-dona tero.

En la vivo de la lando akvo ludas gravan rolon. En tempo de multa pluvo la fosaĵo drenas la teron. Kiam sekas ili irigacie redonas trinkon al la soifa grundo. Kiel vojo la akvo gravas kiom la formala ŝoseo el makadamo kaj boatoj kaj ŝipetoj ĉiu-momente montras sian utilon. Ne miru vidante eĉ bovinon aŭ ĉevalon en boato! La farmisto tute racie, kvankam aĉdace, uzas la plej mallongan vojon de unu kampo al alia.

Ŝajne la plej elstara trajto ĉe la popolo estas la individuismo. Kiel la brita popolo, simile malgranda, ankaŭ ĝi tra la jarcentoj trudis sian personecon al la mondo. Ĝiaj filoj en malgrandaj ŝipoj spitis la nekonataĵon. Defiante la naturajn barojn de maro, ŝtormo, tempesto kaj klimato, kun pafilo en unu mano kaj Biblio en la alia, ili pioniris novajn vojojn trans la terglobo ĝis la plej malproksimaj anguloj. En Novzelando, en Ameriko (kiom da homoj ankoraŭ memoras, ke Novjorko antaŭe estis Nova Amsterdamo?) ili lasis sian signon. Suden je ordono de la fama Deksepo — tiu kolektivo de entreprenemaj komerc-aventuristoj, kiu direktis mondan komercon el sia sidejo en Oude Hoog Straat en Amsterdam—iris van Riebeeck al la suda pinto de la kontinento afrika kaj tie plantis la semon el kiu kreskis la sudafrika nacio, ankoraŭ konservanta, malgraŭ (aŭ ĉu spite de?) la brita influo, karakteron nederlandan en multaj siaj institucioj, en sia vivmaniero, en sia lingvo.

Diri, ke la naturaj kondiĉoj muldas la temperamenton de popolo signifas nur ripeti kliŝfrazon. Tamen valoras tion emfazi en rilato kun la popolo de

la “malalta lando”. Ilia multjara lukto kontraŭ la naturaj fortoj, precipe kontraŭ la ondoj de la Norda kaj Suda Maroj, kun altvaloraj teroj kaj loĝloko kiel vetaĵoj, la senĉesa strebado teni la teron gajnitan, ĉio tio hardis la spiriton de la nederlandano kaj instruis al li ŝati tion, kion li akiris en ŝvito, sufero, penado kaj klopodo. Tio nepre devis lasi sian stampon sur la popolo ĉar ne nur la homoj rekte partoprenantaj en la lukto kontraŭ la maro sed ankaŭ la tuta popolo scias, ke tiuj digoj remparantaj laŭ la mara bordo estas la sola garantio pri ilia prospero, ilia feliĉo, ja pri la vivo mem. Tio kreis tiun memstarecon, tiun obstinon, tiun individuismon, kiuj ankoraŭ forte trajtas en la karaktero de la nederlandano.

Tiu memstareco montras sin en diversaj manieroj. En Haarlem ekzemple la plej granda kaj plej moderna magazeno de la urbo staras ĉe stratangulo ĉirkaŭ unu malgranda vendejo, kiu nanas je kontrasto. Malgraŭ ĉiuj ofertoj la posedanto laŭdire rifuzis vendi sian insulon, kiu fizike dronas sub la pezo de tiu koloso, sed kiu spirite monumentas je la strebo konservi la individuismon de la homo. Verŝajne la sama kaŭzo sin montras en la relativa malforto de la kooperativa movado en Nederlando. Starante sur kiu ajn stratangulo en kiu ajn nederlanda urbo la forta individuismo trudas sin al la rigardo. Neniu domfasado similas la najbaran! En tio efektive kernas la ĉarmo de la urboj tra la lando: la diverso, la koloro, la fortaj kontrastoj ĉe arkitekturo en eĉ ordinaraĵoj. En ĉiu strato ŝtupas unu aŭ pli de la tipe malaltlandaj gabloj, kiuj, precipe en nokto de plena luno, kiam la banalaĵoj de la nuntempa ĉiutago

diskrete kaŝiĝas en ombro, per siaj siluetoj kontraŭ la fono de la firmamento portas nin image returne al la mezepoko.

La procedo de lukto kreis en la popolo stabilon. La homoj rajte povas fieri pri siaj atingoj en diversaj sferoj. Ne malpleje estas la rezultoj en la sfero mondfinanca. Inter la multaj kurzoj de la mondo la guldeno nun rangas kun la multe sopirata dolaro, kiel “malmola valuto”. Tio sekvis el la streboj de la popolo “stari sur propraj piedoj” kaj spegulas ankoraŭfoje la internan riĉon kaj laboremon de la popolo. La butikoj ĉie kreas je abundo kaj fremdulo povus erari supozi, ke li venis en landon de milionuloj, juĝante ankaŭ laŭ la svarmo de luksaj aŭtoj sur la stratoj.

Por tamen kompreni, ke la bildo havas diversajn flankojn, valoras fari viziton al la regiono tuŝita de la inunda katastrofo de la pasinta printempo. Tie oni vidas unu el la faktoroj, per kiuj mezuri la karakteron de la nederlandanoj. Veturante ĉu per aŭto ĉu per trajno oni subite transiras de riĉa verda tereno ridetanta je koloro kaj varmo, kun bienoj florantaj je prospero, en terenon dezertan, silentan. Ĝis la rigardo povas atingi videblas nur la griza ŝlimo de la mara fundo kovranta la tutan kamparon. El ĝi altiĝas nigraj skeletoj de arboj, mutaj atestantoj pri la venenita humo sube. Ruinoj de farmodomoj jen kaj jen izolas en melankolia soleco. Neniu moviĝas. Neniu vivas. Regno de morto.

Tamen la lukto eĉ por momento ne ĉesis. Ĉiuj breĉoj estas ŝtopitaj. La digojn oni ĉie riparas kaj plifortigas. Akvon oni senĉese elpumpas, kaj la

fino sur paĝo 49

Belartaj Konkursoj, 1953

Raporto de la Sekretario

I. Literatura Sekcio. La juĝa komisiono konsistis el la jenaj membroj : Akademianoj S-ro S. La Colla, D-ro F. Szilágyi, Prof. G. Waringhien ; S-roj R. Bernard, E. A. Haugen, R. Rossetti.

Partoprenado okazis laŭ la suba tabelo. La simplaj ciferoj donas la nombron da personoj, la enkrampaj donas la nombron da konkursaj verkoj.

La dua kolono ("G") de ĉiu fako donas la nombron da gajnoj por la koncerna lando.

Lando	Originala Poezio	G	Traduka Poezio	G	Originala Prozo	G	Originala Dramo	G
Anglujo ..	1 (3)		1 (3)		2 (5)	3	2 (4)	2
Aŭstralio ..					1 (1)			
Aŭstrujo ..	1 (2)		2 (4)		3 (4)	1		
Brazilo ..	1 (3)		1 (3)		1 (1)		1 (1)	
Ĉeĥoslovakujo ..	2 (6)	1	1 (3)		1 (3)	2		
Danlando ..	2 (4)	1	2 (5)					
Francujo ..					2 (2)			
Hispanujo ..					1 (1)			
Italujo ..	2 (3)		3 (5)	1				
Jugoslavujo ..	1 (1)				2 (3)	1		
Nederlando ..	1 (1)		1 (2)					
Norvegujo ..	1 (1)		1 (1)	1				
Portugalujo ..			1 (1)					
Skotlando ..	3 (5)	3	3 (6)	3	2 (2)		2 (2)	1
Svedujo ..	1 (3)				1 (1)			
Urugvajo ..	1 (1)							
Sumo ..	17 (33)		16 (33)		15 (23)		5 (7)	

Entute 96 verkoj el 16 landoj. El ili du devis esti rifuzitaj pro troa longeco. Kelkaj aliaj superis malgrave la anoncitan maksimumon ; ilin la komisiono decidis allasi.

Kelkaj el la pseŭdonimoj estis iom "diafanaj". Ni petas, ke konkursantoj ne uzu estonte por pseŭdonimo la ĉefliterojn, aŭ mallongigojn, aŭ anagramon de sia nomo, nek la saman pseŭdonimon, kiun ili uzis en antaŭa jaro ! Pseŭdonimo finfine estas *kaŝnomo*.

Ĉiu premiito ricevas diplomon kaj ankaŭ monpremion (okaze de neeblo transpagi valuton, la gajninto povas elekti librojn en egala valoro). Pro la alta nivelo de la verkoj ĉi-jare, la juĝa komisiono decidis dividi la premiajn monrimedojn en pli multajn partojn por doni, krom la tri ĉefpremioj, ankaŭ

plurajn pli malgrandajn meritpremiojn. Al tio grave helpis du tre dankindaj donacoj al nia premia kaso : 10.000 dinaroj de la Loka Kongresa Komitato en Zagreb, kaj £3–3ŝ. de la Brita Esperanto-Kongreso en Bournemouth.

Jen la listo de la venkintaj verkoj :—

Originala Poezio

1. El "*La infana raso*," de William Auld
2. *La Soleca Dio*, de John S. Dinwoodie
3. *Renkontiĝo*, de Eli Urbanova kaj
La Granda Aventuro, de John S. Dinwoodie
5. *Matena Distriĝemo*, de Poul Thorsen

Traduka Poezio

1. *Antaŭparolo de la virino el Bath* (Chaucer) de W. Auld
2. *Eltenu, mia kor'* (A. Lang) de J. S. Dinwoodie
3. *Admono al Junulinoj* (Montgomerie) de J. S. Dinwoodie
4. *Lasta Preĝo* (Ada Negri) de Luigi Minnaja
5. *La Ministo* (H. Ibsen) de Henry Fridén

Originala Prozo

1. *Senhejmulo*, de R. J. French
2. *La Limo*, de Jolanthe Leser
3. *Portreto de Poeto*, de Marjorie Boulton
4. *La Kaptilo de Dio*, de Marjorie Boulton
5. *La Sorĉisto*, de Stepan Urban
6. *Mensog' nia ĉiutaga*, de Takač Zeljko
7. *Ferioj kun la Muzo*, de Stepan Urban

Originala Dramo

1. *La Sinjorino, kiu kredis*, de Gerald C. Jervis kaj
Kvazaŭ birdoj konstruas, de William Auld
3. *La reaĉeto de princo*, de Marjorie Boulton.


II. Sekcio de arto grafika kaj plastika. Al la anoncitaj branĉoj de ĉi tiu nova sekcio (Esperanta afiŝo kaj ilustro de Esperantaj verkoj) ne venis sufiĉe da partoprenaĵoj. Ni transportos la ricevitajn verkojn al la venonta jaro kaj reanoncos la konkurson.

III. Deklamado.

1. Carlo Minnaja : *Estas mi Esperantisto*, de Julio Bahy.
2. Radmila Sakaĉ : *Ĉe Lesboso*, de N. Hohlov.

R. Rossetti.

KONSTANTE PORTU LA VERDAN STELON



Tra la Libraro

Duope ricevitajn verkojn ni recenzas ;
unuope ricevitajn nur mencias.

*=akireblaj ĉe U.E.A.

*La recenzinto estas libera en sia prijuĝo de verkaĵo.
Lia opinio ne ligas la Asocion aŭ la Estraron de U.E.A.*

*Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj.

Slovenia Esperanto-Ligo, (Eldona sekcio), Ljubljana, 1953. Bind. 312 paĝoj, 24 × 17.5 cm. 16ŝ. 6p., afranko 9p.

Fokuso-1953 de la Esperantomovado estis Jugoslavujo—lando, en kiu centoj da okcident-eŭropanoj trovis atmosferon tute nekonatan al ili. Por subteni la rememoron al la spertoj dum la kongresa restado aŭ kiel kompenso al tiuj, kiuj ne povis persone viziti Jugoslavujon, nun alvenis la supre anoncita libro. Ĝi estas konvinka pruvo pri la laboremo, la kuraĝo, ja aŭdaco, de la jugoslavaj Esperantistoj, kiuj riskas tian altprezan eldonon en la eksterordinare malfacila libromerkato.

Sur 300 paĝoj, abunde ilustritaj, inter kiuj kelkaj koloraj bildoj kaj geografiaj karto, la aŭtoroj kondukas la leganton tra la historio kaj la kulturo de la jugoslavaj popoloj, kune formantaj la federacian popolan respublikon.

La libro komenciĝas per detala priskribo pri la geografio kaj geologio de la lando kaj plue pritraktas tre larĝe la evoluon de la ŝtata kaj socia strukturo de nuna Jugoslavujo. Dume ne estas forgesitaj la instruado, la korpa kulturo, la sporto kaj la stato de religio en la Tito-ŝtato. Atente traleginte la tutan verkon oni ricevas ampleksan kleriĝon pri ĉiuj

problemoj, solvitaj aŭ solvotaj en ĉi tiu lando post la fera kurteno, la sola tiea lando kun fortaj ligiloj al la okcidento.

Oni povas facile klarigi, ke tia libro, kreita per kunlaboro de multaj spertaj samideanoj, stile ne povas esti homogena; la antaŭparolo jam aludas tion. Laŭ mia opinio tio tamen ne estas mallaŭdenda, tial ke la stilaj diferencoj tute ne ĝenas, eĉ donas riĉan komparmaterialon al gramatikaj frandemuloj, al kiuj — cetere — la verko ne estas destinita.

Ne, ĝia tasko troviĝas sur tute alia tereno, tereno speciale rezervita por la Esperantistoj: tiu de la interkompreniĝo popola. El tia vidpunkto mi forte aplaŭdas ĉi tiun eldonon. Mi esperas, ke ĝin sekvos multaj aliaj, el plej diversaj landoj. Sur bazo de realismo, per praktikaj kaj veraj pruvoj ni, Esperantistoj tutmondaj, ekkonu unu la alian. Ni legu pri la historio de aliaj popoloj (ofte “malamikaj” popoloj), ni studu la malfacilajn vivokondiĉojn de niaj najbaroj. El tia studo, ebligita per libroj kiaj la nun recenzata, riveligu la vero, ke ankaŭ la najbara ŝtato ne estas paradizo, ke ne ĉiuj popoloj (escepte la nia !) estas imperialismaj.

Mi opinias, ke la aŭtoroj kaj kompilintoj de *Jugoslavio kaj ĝiaj popoloj* bone efektivigis la taskon, kiun ili donis al si mem, ke ili atingis sian celon sen troigo.

Ke vivu ĉiuj gentoj,
eksopirantaj pri la hor',
ke tra la kontinentoj
disput' el mondo estos for.

Per ĉi tiu poemo de France Preŝeren malfermiĝas la libro. Ĝi estas samtempe la gvidanta motivo por la enhavo. En la jugoslava popola respubliko ja ne vivas unu unueca popolo, sed pluraj diversaj kaj diferencaj popoloj, ĉiu kun siaj propraj historio, lingvo kaj moroj. El tia multeco fari unuecon: jen tasko por granda ŝtatviro, jen ankaŭ la vojo de la sufero de ĉi tiuj popoloj dum multaj jarcentoj: popoloj premitaj (ofte subpremitaj) inter oriento kaj okcidento.

Pri ĉi tiuj popoloj, kun historio trempita en sango kaj larmoj, nin rakontas la supre anoncita libro. Ke la Esperantistaro ĝin akceptu kun honoro!

M. de Waard.

II Kongreso di Bologna "Pro Esperanto", eldonita de la Loka Kongresa Komitato. 106 paĝoj, 22 × 16 cm., broŝ. Prezo neindikita.

De la 6a ĝis la 10a de septembro 1952 okazis en Bologna la Itala nacia Esperanto-kongreso sub la devizo "Pro Esperanto". La libro prezentas riĉan dokumentaron pri tiu ĉi elstara kongreso. Precipe menciindaj estas la paroladoj de la prezidanto de la kongreso, Prof. D-ro Canuto, kaj la prelegoj de Prof. D-ro Ivo Lapenna, Prof. D-ro Gino Botiglioni (de la Universitato en Bologna) kaj Prof. D-ro Umberto Toschi (de la Universitato de Bologna). La libro, verkita en la itala lingvo kaj riĉe ilustrita, havas grandan dokumentan valoron kaj certe kontribuos al plua disvastigo de Esperanto en Italujo.

I.L.

Aŭstria Antologio 1-4, kompilita de al Aŭstra Esperanto-Instituto. Verlag (Eldonejo) "Tramondo", GmbH., Wien XV, Fünfhausg. 16. 64 p., 20.5 × 14.5 cm., prezo 4 int. rpk.

Ĉi tiu verko konsistas el la kvar unuaj manuskriptaj kajeroj de la Aŭstra Antologio, poste aperonta libroforme. Diversaj bonekonataj eroj el la aŭstra literaturo troviĝas en la nuna eldono, kun paralela Esperanta traduko. Ankaŭ troviĝas bona historia enkonduko de D-ro E. J. Görlich. La libro povas esti utila diversmaniere, ekz. al germanlingva komencanto en Esperanto, al negermanlingva Esperantisto deziranta lerni la germanan lingvon, al studanto de la tradukarto kiu scipovas ambaŭ lingvojn, al literaturamanto scipovanta ambaŭ aŭ unu el la lingvoj kaj fine al propagandisto, kiu volas interesi neesperantistajn lingvemulojn pri nia lingvo. Mi jam uzis ĝin tiel. La traduknivelo estas ĝenerale alta kaj estis aparta plezuro por mi rekonatiĝi kun la mezaltgermana originalo de *Under der Linden* de Walther von de Vogelweide —plezuro intensigita per komparo kun la ĉarma traduko de ĉi tiu malnovega poemo en nian tre novan lingvon. Mi deziras grandan sukceson al ĉi tiu kuraĝa entrepreno, kaj salutis ĝian imiton en aliaj landoj.

K. I. Stephenson.

Sinjo's Sprung über die Grenzpfähle de S. E. Schmalzriedt. Eld. Veitsburg-Verlag Ravensburg, 1953. 20 × 14 cm., 190 p., bindita. Prezo neindikita.

Knabino 14-jara entreprenis tute sola vojaĝon tra la eŭropaj landoj. Por tiu celo ŝi utiligis ĉiam nur la Internacian Lingvon. Siajn travivaĵojn kaj spertojn Sinjo nun

rakontas vivece, sed simple kaj klare, kun multe da talento. La libro, verkita en la germana lingvo, estas legata kun streĉa intereso kaj ĝi ne povas ne eĥi pozitive en la animoj de la junularo. La aŭtorino preskaŭ sur ĉiu paĝo akcentas la grandegan valoron de Esperanto, kaj tiusence la verko estas unu el la plej trafaj kaj plej laŭtaj dokumentoj pri la eksterordinara praktika valoro de la Internacia Lingvo. La lasta ĉapitro havas la titolon "Mi tute ne estis en eksterlando". Ĝi estas konciza esprimo de ĉio, kion post tiu longa vojaĝo sentis la juna verkistino: Esperanto faris, ke ŝi ĉie estis hejme. Libro, kiun ni tre varme rekomendas al la germanlingva junularo.

I.L.

Esperanto en 30 lecionoj, de Prof. F. Novljan. Eld. "Školske Novine", Zagreb, 1953. 20 × 14 cm., 79 paĝoj, broŝ. Prezo neindikita.

Tre taŭga lernolibro de Esperanto en la kroata lingvo, aranĝita en formo de dialogo inter instruisto kaj lernanto. En la unua kolono troviĝas la Esperanta teksto, en la dua la kroata traduko. La klarigoj de la gramatiko estas senriproĉaj, la ekzemploj tre trafaj.

I.L.

Esperanto za Sole, Teĉaje in Samouke (Esperanto por la lernejoj, kursoj kaj memlernantoj) de Prof. Rudolf Rakuŝa. Eld. "Državna Založba Slovenije", Ljubljana, 1951. 20 × 15.5 cm., 115 paĝoj, bind. Prezo neindikita.

La lernolibro de nia konata pioniro kaj membro de la Akademio, Prof. R. Rakuŝa, donas ne nur solidan scion de Esperanto al ĉiu lernanto, sed samtempe kontribuas al pli korekta komprenado de la socia rolo de la

lingvo. Krom la plena gramatiko kun multaj ekzercoj kaj malgranda vortareto, la libro enhavas eldirojn de famaj verkistoj kaj scienculoj pri Esperanto. En ĝi la aŭtoro ankaŭ rebatas la plej oftajn "argumentojn" kontraŭ la Internacia Lingvo. La lernolibro estas verkita en la slovena lingvo.

I.L.

Nederlando : de paĝo 44

procedo de sensaligo de la grundo komenciĝis. Tio daŭros du-tri jarojn kaj la tero ne normale produktos dum ankoraŭ kelkaj jaroj. La homoj tamen rigardas en la estontecon ĉiam kun fido pri siaj fortoj. Ili venkos, kiel ili ĉiam venkis. Pacienco, persisto, laboro regajnos tion kio momente estas perdita. La naturaj fortoj havis provizoran venkon, sed ili, jes eĉ ili, devos fine cedi antaŭ la obstino kaj disciplino de ĉi tiu malgranda sed verë granda popolo.

En la listo de la 10 plej bonaj verkoj aperintaj post la milito (laŭ "Esperanto en Skotlando", "Nederlanda Esperantisto" k.a.) troviĝas ambaŭ verkoj de D-ro Ivo Lapenna :

RETORIKO kaj AKTUALAJ PROBLEMOJ

Nuna prezo : ĉiu libro 12 ŝil.,
afranko 6p.

Se vi ankoraŭ ne legis ilin,
mendu tuj ĉe via landa libroservo
aŭ ĉe

**Universala Esperanto-Asocio,
Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo**



Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimatajn opiniojn.

Interna ideo

Ni reproduktas leteron kies enhavo certe mirigos kongresanojn :

En artikolo pri la Interna Ideo en la decembro-numero vi skribis ke “kiu por la unua fojo ĉeestis internacian kongreson tuj sentis tiun ĉi ligitecon k.t.p.”

Mi tre bedaŭras ke mia sperto estas tute mala (kaj ne nur la mia). Kiam mi ĉeestis internacian kongreson de Esperanto mi sentis min kiel homo kiu hazarde renkontas amikaron iom ebrian. Li povas elekti: foriri tuj aŭ ebriiĝi kiel eble plej baldaŭ. La kompatindaj novbakitaj esperantistoj eĉ ne havas tiun elekton. Ili restas solaj kaj perdiĝas en la homamaso. La spertaj Esperantistoj tute ne deziras interrilati kun la progresantoj.

Feliĉe, mi renkontis kelkajn ali-landajn negravulojn kaj ni balbutis kelkajn agrablajn horojn. Afablaj homoj troviĝas ĉie, eĉ inter la esperantistoj, sed por tio ni ne bezonas universalan kongreson.

Sincere via,

N. H. Beun, Haarlem.

Legante tiun ĉi leteron ni senvole pensas je teksto sankta por milionoj da homoj :

“Kaj kiam venis la Pentekosta tago, ili ĉiuj estis unuanime en unu loko. Kaj subite venis el la ĉielo sono kvazaŭ blovego de forta vento kaj ĝi plenigis la tutan domon, kie ili sidis.

Kaj al ili apartenis disirantaj langoj kvazaŭ el fajro, kaj sidiĝis sur ĉiun el ili. Kaj ĉiuj pleniĝis de la Sankta Spirito kaj komencis paroli aliajn lingvojn, kiel la spirito donis al ili parolpovon.”

Kaj plie . . . “Sed aliaj moke diris : ‘Ili estas plenaj je dolĉa vino’”

Ĉiam kaj je ĉiu epoko ekzistis homoj, kiuj trovis ke la entuziasmo similas je ebrieco. Nu, kio nun koncernas supran opinion, ni simple diru, ke estas atentinda, ke lingvo kreas tian esprimon de sentoj. Esti ebria spirite per, pro, por, pri Esperanto estas laŭ nia opinio, nur dokumentigo pri la povo kiun ekzercas nia afero sur nombro da homoj.

H.J.

ESPERANTISTA FERIO EN LOFTHUS

11-18a de aŭg. 1954

Venu pasigi vian ferion en belega regiono Hardanger en okcidenta Norvegujo ! Intima, amika kunestado kun gesamideanoj el multaj landoj.

Prelegoj, diskutoj, distraĵoj. Allogaj ekskursoj.

Ĉiujn informojn donos

Okc. Distr. de N.E.L.,

Kristian Sivertsen,

Blekenberg 52,

Bergen, Norvegujo.

Harold Holt :

Aŭstralia Ministro por enmigrado

**2,000
kilometrojn
trans la maro**



**Aŭstralio
bonvenigas
enmigrantojn**

(En Aŭstralio, la insula kontinento, okazas unu el la plej grandskalaj kaj intensaj enfluoj de enmigrantoj en la historio de la mondo. 750.000 homoj transveturis la terglobon al la antipodoj post 1945. Estas rakonto de aventuro, de pionirado kaj samtempe de detala organizado de la aŭstralia registaro kaj la internaciaj institucioj. En ĉi tiu artikolo, speciale verkita por *Esperanto*, la aŭstralia Ministro de Enmigrado, Sinjoro Harold Holt, priskribas la postmilitan programon de migrado kaj ĝiajn ekonomiajn kaj sociajn rezultojn.)

JE la fino de la dua mondmilito staris antaŭ la aŭstralia popolo la urĝa tasko pligrandigi la enloĝantaron. La 7.000.000 aŭstralianoj multe klopodis kaj multe suferis dum la ses jaroj de milito. Ili lernis pri la danĝeroj kiuj povas minaci malgrandan popolon en vasta, nesufiĉe loĝata lando. Aŭstralio bezonis homojn por malfermi la neekspluatajn kampojn, por ekmanumi la maŝinojn de industrio, por konstrui domojn, lernejojn, hospitalojn kaj fabrikejojn. Ĝi bezonis ilin por ke ilia laboro kaj sperto estu haveblaj por la grandaj naciaj projektoj kiuj provizos la necesan energion, lumon kaj akvon al la vastaj areoj kiuj tenas la ŝlosilon de la evoluigo kaj sekureco de la morgaŭa Aŭstralio.

En la serĉo de enloĝantaro Aŭstralio kompreneble sin turnis unue al la Unuigita Regno (Granda Britujo kaj Norda Irlando) kaj eltenis bonvenigan manon al sia kara kuzaro en la



*Baltaj migrantoj al Aŭstralio
amuzas sin ĉe la rivero Murray*



*Nederlanda
familio en
naciaj kostumoj
migras al
Aŭstralio*

Insuloj Britaj. Senpaga kaj subvenciata transporto estis ofertata kaj akceptata. Fluego de britaj enmigrantoj komencis trans la 20.000 kilometrojn inter Grand-Britujo kaj Aŭstralio. Vojaĝantoj povantaj pagi la tutan transportkoston ŝveligis la ciferojn. La registaroj de la Unuigita Regno kaj Aŭstralio harmonie laboris por efektivigi la planojn. Dum la postmilita periodo, dank' al la "Konvencio pri helpata transporto" de marto 1947, pli ol 360.000 britoj estas komencintaj novan vivon en Aŭstralio.

Tiam venis la voko al la liberaj landoj de la mondo helpi pri la tasko reinstali la milionojn da homoj kiujn la milito dislokgis en iliaj landoj kaj hejmoj. Aŭstralio respondis al la voko, subskribis kontrakton kun la Internacia Organizaĵo por la Rifuĝintoj (I.R.O.) kaj malfermis siajn pordojn al miloj da dislokgitaj homoj. Kiam I.R.O. kompletigis sian laboron de rehejmigo je la fino de 1952 pli ol 180.000 homoj estis trovintaj novan hejmon en Aŭstralio. La aŭstralia

atingo de enpreno estas superita nur de Usono kaj, proporcie al enloĝantaro, multfoje superas tiun de iu ajn alia lando.

Aŭstralio daŭre klopodas, serĉante pli kaj eĉ pli da novaj enloĝantoj, kiuj kunuzos kun la indiĝenoj la eblecojn kaj respondecojn de nacikonstruado. Traktatoj pri enmigrado estas subskribitaj de la aŭstralia registaro kun Nederlando kaj Italujo, kaj oni ĵus atingis subskribon de traktato kun Germanujo.

Rezulte de ĉio tio kaj de alta naskonivelo la enloĝantaro de Aŭstralio pligrandiĝis dum la periodo de januaro 1947 ĝis decembro 1952 je 1.235.000 ĝis 8.750.000. Migrado kaŭzis 46.4 procentojn de tiu tuta pligrandiĝo.

Tiun grandskalan programon de migrado ebligis la bonaj ekonomiaj kondiĉoj en Aŭstralio en la jaroj kiuj sekvis la militon. Plej altaj prezoj de lano, kresko de industrio kaj grandaj projektoj de irigacio kaj elektra energio ĉiuj aldonis al la eblecoj kaj prospero de la periodo dum kiu ĉiuj


laborkapablaj homoj inter la nove alvenintoj dungigis sen malfacilaĵo. Dum favoraj ekonomiaj kondiĉoj daŭris la laborkazoj plinombriĝis kaj la enpreno de migrantoj pligrandiĝis.

Dum 1951 kaj 1952 tamen la prezoj de lano falis kaj la subita malaltiĝo de mongajno de eksportaĵoj, kune kun malgrandiĝo de la enfluo de eksterlanda kapitalo, afektis la tutan aŭstralian ekonomion. Limigaj reguloj devis esti formulitaj por ekhalti la rapidan malboniĝon de la pagobilanco. Ĉar la monprovizoj de la bankoreto ege mallikvidiĝis oni regulis pli rigide la uzadon de kapitalo. Rezulte de tiu ŝanĝo de kondiĉoj la aŭstralia ekonomio eniris periodon de ekonomia re-alĝustigo.

En julio 1952, konforme al tiuj ŝanĝiĝintaj kondiĉoj, la aŭstralia registaro malgrandigis la nombron de la tuta migrada programo. Interne de la reviziita programo elektado de

enmigrantoj celis havigi lertajn metiistojn por metalfabrikado kaj elektro-tekniko kaj ankaŭ spertajn farmlaboristojn. Samtempe pli da emfazo estis metata sur la envenigon de familioj kaj dependantoj de laboristoj jam en Aŭstralio.

Tiu malgrandiĝo de enpreno ne indikis malfortiĝon de la intereso de Aŭstralio pri migrado. Enmigrado estis restonta daŭra parto de la nacia progreso. Eĉ dum 1953 plua 80.000 migrantoj eniris Aŭstralion, kaj oni antaŭvidas 90.000 dum 1954. Sed Aŭstralio intencas certigi, al ĉiu kiu akceptas ĝian inviton partopreni ĝian naciecon, kaj sekurecon kaj laboron. Nun Aŭstralio deziras rekomenci plenskalan enmigradon kiel eble plej baldaŭ. Estas multaj eventualaj okazoj por novaj koloniantoj en la kontinento. La pli granda ekonomia stabileco kiu nun evidentiĝas estas bona aŭguro por frua pligrandiĝo de la iomete limigita fluo de la lasta jaro.



Bovistoj deĵoras ĉe la Aŭstraliaj Alpoj

Kio estas atingita per la kvinjara klopodo? Se ni ekzamenas la rezultojn ni vidas hejmojn, fabrikejojn, lernejojn, universitatojn, hospitalojn, ŝoseojn kaj fervojojn; ni vidas digojn kaj riverbarilojn; ni vidas firme starigitan kaj vastan irigacian kaj hidroelektran projekton de la Neĝaj Montoj; ni vidas sur la grafikaĵo la linion de la aŭstralia enlogantaro krute suprenirantan.

Sed tio ne estas la tuta bildo. Ni povas fieri ankaŭ pri aliaj atingajoj. Aŭstralio neniam konsideris nove venintojn al ĝiaj marbordoj nur kiel aldonaĵojn al la laboristaro. Ni bonvenigas ilin kiel niajn homamikojn. Ni kuraĝigas ilin estiĝi aŭstraliaj ŝtatanoj.

Hodiaŭ ni povas alrigardi la tutlandan organizaĵon de la Bonnajbara Movado kiu, pere de ĝiaj miloj da filiĝintaj organizaĵoj libervolaj, laboradas en urbegoj, urboj kaj vilaĝoj tra Aŭstralio, helpante la novan kolonianton senti sin hejme kaj kontenta ĉe ni; ni povas alrigardi la plenan planadon kiu alportas la niaj novaj ŝtatanoj de morgaŭ la okazon lerni nian lingvon kaj nian vivmanieron; ni povas vidi dankeme, kiel la nove venintoj estas akceptintaj la oferton de Aŭstralio enplekti en la vivon de la popolo de Aŭstralio la koloron kaj la kulturon kiun ili kunportis el siaj naskolandoj.

Fine, do, ni povas diri ĉi tion. La enmigrintoj en Aŭstralio estas malavare donintaj siajn donacojn de industrio, laborego kaj kulturo. Reciproke ni estas planintaj kaj klopodintaj por sentigi al ili, ke ili estas novaj aŭstralianoj en ĉiu signifo de la vorto—anoj de nia nacia familio, bonvenaj kaj estimataj partoprenantoj en la estonteco de la nacio kiu nun estas ilia hejmo.

Tiuj estas la rezultoj, tuŝeblaj kaj netuŝeblaj, kiujn ni estas povintaj efektivigi. Tiuj estas la atingajoj de la postmilita enmigra programo de Aŭstralio.

(*tradukis Ralph Harry*).

Fotoj afable liveritaj de la Aŭstralia Registaro.

ESPERANTISTA VIVO

Naskiĝoj

Koopmans. Al Ges. W. H. Koopmans (Vosmaerlaan 3, Hilversum, Nederlando) filino Ieke Tine Donata, la 9-an de Januaro 1954.

Rosbach. Al Ges. Dagny kaj Johan Hammond Rosbach, Sarpsborg, Norvegujo, naskiĝis filo la 3-an de Januaro 1954.

Smith. Al Ges. Norman kaj Helga Smith (10 Broomville Ave., SALE, Cheshire, Anglujo) naskiĝis filo, Mark Anthony, la 4-an de Januaro 1954.

Al ĉiuj ni esprimas sinceran gratulon.

Niaj mortintoj


Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj, al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.

Bianchini, S-ro Giacomo, Cimpello, Italujo, mortis la 12-an de Januaro 1954.

Christensen, Lektoro Nils, prezidanto de la Esperantoklubo en Hamar, Norvegujo, mortis la 12-an de Januaro 1954.

Atentigo. Skribante laŭ informo sur paĝo 40 de tiu ĉi gazeto (Aŭstralio hodiaŭ) al legacio aŭ konsulejo de Aŭstralio, atentu bone, ke via letero aspektu digne kaj serioze. Evitu senutilajn frazojn, restu afera. Plej granda malutilo povos naskiĝi el malatento de tiu ĉi konsilo.

Redakcio.



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horszistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Mallongigoj : I=Informoj. P=Parolado, K=Kurso.

Lundo	18.30–19.00	La Coruña. 250m. P.K. Radio Juventud, Real 71, La Coruña, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 48.74m., 25.46m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur 18-I). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Mardo	11.55–12.00	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	14.30–14.45	Montevideo. 280m. P. Radio Ministerio Ganaderia y Agricultura, Montevideo, Urugvajo.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 75.28m., 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
	22.30–23.00	Valencia. 200m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	17.50–18.10	Roma. 49.92m., 31.35m. P. S-ro Minnaja. Radio Roma, Via Vittorio Veneto 56, Roma, Italujo.
	19.30–19.45	Barcelona. 360m. I.K. Radio Unión, Emisora del Frente de Juventudes, Barcelona, Hispanujo.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m., 188m. I. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.30–07.35	Lille. 218m. I.K. Radiodiffusion Française, Emission Esperanto, 36 Bd. de la Liberté, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	23.05–23.30	Zagreb. 264.7m. I. Radio-Zagreb, Jugoslavujo.
Vendredo	17.50–18.10	Roma. Kiel merkrede. P. D-ro Musella.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K.I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro (DF), Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Hispana Radio. Ni salutas la freŝdatan aperon de du novaj hispanaj stacioj sur nia listo. El Barcelona venas informa programo sekvata de kurso. La malforta potenco de la stacio ebligas nur lokan aŭskultadon.


El La Coruña estas dissendata kurso post hispanlingva parolado pri Esperanto. La kurso estas prezentata laŭ interesa, originala maniero: lernanto legas ekzercojn per telefono, kursgvidanto korektas lin, ĉiuj aliaj lernantoj aŭdas tion hejme per la radioricevilo. La stacio havas la saman sendopovon kiel Barcelona. Ĉiuspecaj propagandiloj, libroj, novaj aŭ malnovaj revuoj, broŝuroj estas petataj de la redaktoro de la programo, kiel helpo al liaj gravaj klopodoj: S-ro Francisco Ortega Becerra, Plaza de España 1 post. II B, La Coruña, Hispanujo.

Radio-Lille. La Esperanto-Kronikoj certe estos baldaŭ ĉesigitaj se ne montriĝos sufiĉa intereso por ili. Ĉiu skribu regule rekte al la Stacio.

El **Sud-Ameriko** venas nova Esperanta voĉo. La mezlonga ondo kredeble trafas nur Urugvajon kaj najbarajn landojn. Elkorajn gratulojn al la iniciatinto de ĉi tiu nova programo.

Radio Roma. 3-II, Novaĵoj el Italujo; 5-II, Kultura valoro de Esperanto ĉe la Radio; 10-II, Florencaj kanzonoj; 12-II, Respondoj al geaŭskultantoj; 17-II, La Insulo Sardinio; 19-II, Italaj belartaj urboj: *Napoli*; 24-II Poeto Govoni; 26-II, Karnavala parentezo.

Enigma Konkurso N-ro 85



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkupono internacia.

Solvoj :

N-ro 191 : Numeru la pecojn de la donitaĵo de 1 ĝis 49, komenciĝante maldekstre supre kaj finiĝante dekstre malsupre, kaj tiam metu ilin laŭ la ĉi-flanka vicordo.

48	36	4	27	19	33	14
9	29	16	43	22	2	38
26	1	40	34	7	49	18
39	13	31	10	45	24	6
15	44	23	3	37	12	32
21	5	46	35	17	47	28
30	25	11	20	41	8	42

N-ro 192 : Sia estas kara, pli ol najbara (765). Simpatio - indiĝeno - ambrozio - episkopo - sardinio - tabureto - aluminio - stadiono - kapriolo - aforismo - redakcio - antipodo - paronimo - lampiono - izoterma - ordinara - laŭreato - neŭralgio - atributo - judaismo - biografo - atavismo - reostato - artiŝoko.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 81-a konkurso : S-ro S. Roca y Rodo (Hisp) 146, S-ro H. Friess (Germ) 143, S-ro C. Boute (Belg) 138 p.

Enigmo N-ro 195 : El la literoj de ĉiu donita paro da vortoj faru novan vorton, aldonante plian literon, laŭ la menciita difino. Tiuj aldonotaj literoj en la donita sinsekvo formas esprimon el la proverbaro de D-ro Zamenhof. 1. rabi+rato=spekulacia operacio ; 2. laro+vaki=parto de armeo ; 3. fari+gado=muskolo apartiganta la bruston de la ventro ; 4. paĝo+arto=melodiornamo ; 5. pure+tago=rezina gumo ; 6. figo+ergo=scienco ; 7. rabi+nano=loĝas proksime ; 8. reno+kiso=dissekco de kadavro ; 9. arka+tigo=fleksebla organika teksaĵo ; 10. kiel+vagi=bela floreto ; 11. celi+ingo=densa dolĉa fluaĵo ; 12. tial+krom=numero de listo en kiu oni enskribas membrojn ; 13. melo+pano=uzo de vortoj superflujaj ; 14. mono+tria=homo sen propra volo ; 15. lano+bero=paperrubando ; 16. reno+ario

=varmejo ; 17. led+mano=juvelo por konservi portreton ; 18. kapo+tani=legomo ; 19. kiam+silo=reproduktaĵo ; 20. tero+peno=membrano entenanta intestojn ; 21. regi+lato=nedividebla tuto ; 22. cedi+arko=ordeno ; 23. sago+noti=melankolio ; 24. erpi+milo=surtegmenta fako de veturilo ; 25. ario+figo=rakonto pri la vivo de iu ; 26. fari+kilo=spicaĵo ; 27. legi+fugo=birdo ; 28. tria+peco=opinio de la publiko pri la vivo de iu.

Enigmo N-ro 196 : La tuto konsistas el 104 literoj kaj estas elparolo de D-ro Zamenhof, kiun mi legis en unu el la lastaj numeroj de *Esperanto*. 38-55-87-21-15-58-84-52-3-100=juĝo per kiu la atenanaj kondamnis al ekzilo ; 43-7-104-90-24-91-13-73=tribunalo ĉe la antikvaj hebreoj ;

fino sur paĝe 61

Paul Heinrich :

La Alvoko de la Konscienco

EN la vasteco de la argentina pampo aŭtomobilo moviĝis okcidenten. Tute ebena kaj senkurbiĝa estis la tereno. Nur okcidente, sed tre malproksime, konturiĝis la giganta montaro, la Andoj, kontraŭ la sennuba firmamento. La varmega suno jam devigis la veturiganton demeti sian jakon.

La veturiganto, Sinjoro Peter Birkli, estis 40-jara kunposedanto de magazeno en pampa urbeto. Kune kun Sinjoro Rodriguez li estris ĝin kiel kompaniano. Peter Birkli estis sviso laŭ deveno, sed li bone alkutimiĝis al sia dua hejmlando kaj perfekte parolis la hispanan lingvon.

Ĉi tiun sabatan posttagmezon Peter Birkli estis en gaja humoro. Apud li sidis lia 19-jara kontoristino. Li nun aŭtomobilis al ŝia hejmo, kiu estis malproksima bieno en la pampo. La patro de la fraŭlino estis la bienestro, kaj bona amiko de Peter Birkli. Tial Peter ofte aŭtomobile alkondukis la fraŭlinon hejmen.

Nun ambaŭ gaje kaj serene aŭtomobilis ree tien. La knabino estis nigrhara belulino. Peter nomis ŝin simple Manuela, laŭ ŝia antaŭnomo, kaj ŝi same nomis lin Peter. La aŭtomobilado kun ŝi estis tre agraba plezuro por Peter. Li estis ankoraŭ fraŭlo kaj ambaŭ bone interamikiĝis. Kelkfoje Manuela apogis sian kapon sur la ŝultron de Peter, kiu entuziasme toleris tion. Eĉ li mem karese alpremiĝis al ŝi kaj gajigis ŝin rigardante en ŝiajn nigrajn okulojn. Petole li kelktempe ŝercis, kaj ambaŭ sentis la senĝenan feliĉon de reciproka kunesto. Kun bedaŭro

ili konstatis la alproksimiĝon al la bieno post duhora veturo. El la domo aperis la gepatroj kaj gefratoj de Manuela, kaj ĝoje akceptis ilin. Ili kondukis ambaŭ en la ĉambron, kie jam atendis bona manĝo. La tago pasis tre amuze en komuna interparolado. Kiel ĉiam, Peter poste enlitiĝis en malgranda gastĉambro. Tie li ankoraŭ pensis pri Manuela. Ĝis antaŭ nelonge lia sento por ŝi estis nur amika aŭ kvazaŭ onkla simpatio. Sed nun li rimarkis, ke li estas tute ensorĉigita de Manuela. El ĉiu ĉambra angulo aperis image ŝia bildo, kaj la feliĉo ĉirkaŭis lian liton. Tamen li klopodis rezisti la enamiĝon, ĉar li konsciis la aĝan diferencon. Krome li tre ŝatis sian propran liberecon. Do li ne volis pliigi la reciprokajn sentojn kaj ankaŭ ne malpliigi ilin. Lia lasta penso antaŭ la ekdormo estis, ke la vivo ja estas belega kaj senzorga.

En la mateno li iom evitis la kuneston kun Manuela, kvankam tio estas por li mem iom nekomprenebla. Anstataŭe li rajdis kun ŝia patro en la pampon. Sed post la tagmanĝo li ree aŭtomobilis kun Manuela al la urbeto. Denove brilis la suno kaj gaje ili ŝercis kune, ambaŭ dezirantaj ke la veturo neniam ĉesiĝu.

En la urbeto ili adiaŭis tre malvolonte por prepari sin por la laboro de la venonta semajno. Peter iris en sian loĝejon kaj hazarde elpoŝigis ĉifitan kaj nemalfermitan leteron. Iom honte li rememoris, ke antaŭ du tagoj li ricevis ĝin de sia patrino en la svisa hejmvilaĝo. Subite li pripensis ankaŭ, ke li ricevis jam leteron de la patrino antaŭ tri monatoj, kiun li

ankoraŭ ne respondis. Senvole li pensis pri sia propra vivo. La svisan hejmon li forlasis antaŭ dudek jaroj, kaj li ĉirkaŭvadis en Sudameriko ĝis kiam li malnomadiĝis ĉi tie en Argentino, kie li fondis kun sia argentina kompaniano la magazenon, dank' al iliaj energio kaj entreprenemo. En la tuta tempo li malmulte pensis pri sia patrino kaj ne plu vidis ŝin. Kiam li ricevis leteron de ŝi, li ofte respondis nur perkarte kaj konsideris tion kiel neeviteblan devon. La patro jam mortis kiam li estis knabo, kaj gefratojn li ne havis.

Ĉifoje li maltrankviliĝis, kaj decidis legi tuj la leteron. Per tiu li sciiĝis, ke lia patrino grave estis malsaniĝinta, sed nun malrapide resaniĝas, dank' al la afabla helpo de najbaroj. La teksto ne enhavis riproĉon pro la malskribemo de la filo, tamen la unuan fojon Peter sentis la sopiron de la patrino por revidi lin. Li enpensiĝis. Certe estus eble, ke li veturu al Svislando. Tiu penso tuj trankviligis lin, kaj li komencis okupi sin pri siaj negocaj aferoj.

* * *

La monatoj pasis. Peter Birkli ankoraŭ ne pensis efektivigi sian intencon, kvankam li ne forgesis ĝin. Li plue ĝuis la ĝojigan aŭtomobiladon kun Manuela kaj li konstante prokrastis la vojaĝon. Fine li parolis pri tio kun sia kompaniano, klarigante ke la farto de lia maljuna patrino estas la kaŭzo. Tion komprenis Sinjoro Rodriguez kiu sugestis, ke li veturu trans Rotterdama por tie ordigi kelkajn negocajn aferojn. Peter konsentis kaj nun li rapide preparis la forveturon.

* * *

Sur la ferdeko de la moderna kaj luksa ŝipego Peter Birkli ripozis sur faldebla seĝo, kaj rigardis la fortajn ondegojn de la vasta oceano. La varmega sunbrilo atentigis lin ke la ŝipego alproksimiĝas al la ekvatoro. Apud li sur dua faldebla seĝo kuŝis eleganta francino kun kiu li rapide estis konatiĝinta. Eĉ li nomis ŝin jam laŭ ŝia antaŭnomo, Geneviève. Ŝi estis tre ĉarma kaj aminda fraŭlino. En tuta harmonio ili vigle interparolis aŭ silente rigardis kune la oceanon kaj la firmamenton.

Peter gaje konsciiĝis, ke tiu deviga vojaĝo tiel agrabliĝis. Ŝajnis, ke li ĉiam kaj ĉiel sukcesas agrabligi sian vivon. Tiel li ne tro sopiris al Manuela. Pri sia patrino li tute ne pensis.

* * *

La negocaj aferoj estis ordigitaj en Rotterdama. Kun Geneviève li interkonsentis revidon. Sed li ne tre rapidis hejmen. Li volis laŭeble ĝui la vojaĝon. Nun li sidis sur la ferdeko de germana riverŝipo kaj plezure veturis suden sur la rivero Rejno laŭlonge de la romantikaj bordoj kun iliaj vinbergardenoj kaj kasteloj. Germanaj gejunuloj tostis al li per pokaloj da vino kaj li sammaniere respondis. La gejunuloj bonhumore kantis gajigajn kantojn pri la Rejno kaj vino, kiujn li ĝoje kaj kontente aŭskultis.

* * *

Kvankam Peter ankoraŭ rondvojaĝis tra Germanujo, li nun proksimiĝis al la celo. Ŝipveturante sur la Lago Konstanco jam li vidis la hejmlandan montegon Sântis je la horizonto, kaj li reaŭdis la longe neaŭditan svisgermanan dialekton, sian gepatran lingvon. Nun li memiel ekscitiĝis, kaj li sentis strangan

maltrankvilon. Eĉ li subite ĝojegis kaj li rememoris pri la feliĉaj tagoj de sia infaneco kun sia unike bonkora patrino.

Post albordiĝo en Svislando li tuj vagonare veturis al sia hejmvilaĝo. Jam li vidis iam konatan pejzaĝon, kaj la nomojn de la stacioj li antaŭe sciis parkere pro malnova memoro.

La vagonaro ruliĝis en la celstacion kaj la aplombo de Peter perdiĝis. Staris kelkaj personoj sur la perono, sed tuj li ekvidis sian atendantan patrinon. Grizhara, de maljuneco kurbiĝinta, ŝi venis renkonte al li. Tuj ŝi ekkonis lin. Li vidis ŝian karan vizaĝon kun la ĝojaj larmoj en ŝiaj okuloj, kaj ankaŭ li sentis emocion kaj ĝojon.

“Ke efektive vi revenis, pro tio mi tiom ĝojas”, ŝi diris.

Li povis nur aldoni: “Patrino, mi ankaŭ tre ĝojas ke mi reestas ĉe vi”.

Intertempe li ekvidis brunharan knabineton malantaŭ la patrino, kiu afable salutis lin. La patrino diris, ke ŝi estas la najbara filineto Lisa, kaj ŝi multe helpas ŝin, kvankam ŝi estas nur dek-unujara. Peter sentis honton, ke la fremda infano estas tiom helpema al lia patrino, kaj li kiel filo tute ne estis atentinta pri la patrina sorto dum la pasinta longtempo. Li paŝis kvazaŭ songante tra la stratoj. La plimulto ne estis ŝanĝiĝinta, kaj li sentis strangan solenecon kvazaŭ li reakiras delonge pasintan tempon de sia juneco. Nur lia maljuniĝinta patrino rememorigis lin pri la preterpasintaj jaroj. Tamen ŝia kara voĉo estis la sama, kaj ĝoje li aŭskultis ŝiajn rakontojn.

Kiam ili atingis la hejmdomon, foriris Lisa. Tute emociiĝinta li rigardis sian gepatran domon. Nenio ŝanĝiĝis. Jen la benko antaŭ la domo kaj la bele kulturita ĝardeno. La

samaj floroj sur la fenestraj bretoj. Ambaŭ eniris la loĝejon. Peter miris pri la ordo kaj pureco en la ĉambroj kaj li kortuŝiĝis je la ekvido de la mebloj, kiuj estis la samaj kaj sur la sama loko kiel antaŭ lia foriro. Jen lia lito, floroj sur la tablo kaj sur la muro lia bildo, kiel 18-jara junulo.

Peter staris senmove. Tro fortaj estis la impresoj. Li nur premis la manon de la patrino kaj ne kapablis paroli. Poste li karese metis la manon sur ŝian ŝultron kaj sentante larmojn en la okuloj li nur diris: “Kara patrino”.

Silente ili staris kaj Peter pensis: “Ĉion ĉi tie ordigis kaj beligis la kara patrino por mi, kaj mi tute ne zorgis aŭ pensis pri ŝi tiom multajn jarojn”.

“Venu”, diris mallaŭte la patrino, “ni volas trinki kafon. Mi bakis la kukon, kiun vi ĉiam volonte manĝis”.

La emocio kaptis Peter. Dum la kaftrinko Peter kaj la patrino sentis la feliĉon de senĝena hejmeco, kaj ili babilis kvazaŭ ne ekzistis la disigaj 20 jaroj.

* * *

La tagoj pasis. Peter ne ofte foriris. De la najbaroj li sciiĝis pri la grava malsano de la patrino, kaj ke ŝia koro malfortiĝis spite al la resaniĝo. Admire li observis ĉiun laboron de la patrino. Kiel ekzakte ŝi faris ĉion. Ĉiutage estis ĝustatempe preparitaj la manĝoj, same la ĉambroj purigitaj, kaj ĉiutage la patrino surprizis lin per io ĝojiga. Li mem kutimis helpi ŝin. Li balais la ĉambrojn, sekigis la lavitan vazaron kaj laboris en la ĝardeno, ĉar li vidis ke ofte ankaŭ Lisa helpis tiel.

Tamen ĉar li intencis ankaŭ rondvojaĝi en Svislando, iun tagon li preparistiucele. La patrino komprenis lian deziron, sed li bone rimarkis ŝian malĝojon. Li antaŭe intencis la

rondvojaĝon por pliagrabligi sian restadon hejme, kaj nun li riproĉis sin ke li tiel mallongigis la kuneston kun la patrino.

Kvankam li admire rigardis la grandiozecon de la neĝosupro de la Matterhorn en la svisaj Alpoj kaj la sunajn bordojn de la Lago Maggiore, tamen li ne multe ĝuis la perspektivojn. Liaj pensoj estis ĉe la patrino kaj li interrompis la plezuran vojaĝon. Tiel li revenis pli frue ol li intencis. Li ektimis, kiam li vidis la suferan vizaĝon de la patrino, sed ŝi tuj ridetis kaj diris: “La koro kelkfoje ne volas funkcii”.

Ekde tiam Peter restis daŭre hejme kaj dum sunbrilo li ofte sidis ekstere sur la antaŭdoma benko kun la patrino, de kie ili rigardis la hejml-regionan montegon Sântis. Lisa ofte sidis kun ili aŭ ludis per pilko proksime, kaj Peter estis tre dankema al la knabineto ke ŝi tiom komplezis al la patrino. La patrino ree aspektis feliĉa, kaj Peter ĝojis pro tio. La restado ĉe la patrino tute aliigis lin. Li ne plu pensis pri agrablaĵoj. Ankaŭ ne multe pri Manuela aŭ Geneviève. Ilin li ja revidos kiam ajn, eĉ ŝajnis al li jam ne tre necese. Lia zorgo estis nur pri la patrino.

* * *

La lastaj kvar tagoj alvenis. Peter ĝis nun ne kapablis diri al la patrino la daton de sia adiaŭo. Sed hodiaŭ li volis fari tion. Tamen, kiam li vidis ŝian feliĉan rideton ĉe lia eniro, li ne kapablis ĝin diri. “Estu panjo nur hodiaŭ ankoraŭ feliĉa”, li pensis. Ankaŭ la tagon poste li same agis. Sed la antaŭlastan tagon li fine diris ĝin. La patrino silente kapjesis. Ŝi ja sciis, ke tiu momento venos. La feliĉa rideto malaperis de ŝiaj trajtoj. Ŝi nun preparis ĉion por la

forveturo, gladis liajn tolaĵojn kaj faris ĉion necesan. Kun zorgo Peter observis ŝin. “Ho, ke la pasema tempo ekhaltus”, li pensis. Sed senhalte ĝi pasis. Kiel ĉiam, sed nun kun larmoj, la patrino deŝiris la datan slipon de la kalendaro. Peter konstatis tiel ankaŭ la lastan tagon hejme, kvankam li ja sciis tion, kun peza sento en la koro. Morgaŭ, dimanĉon, frumatene li forveturos. Li volis diri al la patrino ion bonan, ion kondolan, sed li ne sciis kion diri. En la vespero la patrino per la gramofono muzikigis por iel ĝojigi ankoraŭ lin. Li kortuŝite aŭdis la popolmuzikon de sia svisa hejmlando.

Poste, kiel ĉiam, dirinte “bonan nokton”, li iris por enlitiĝi en sia ĉambro. Sed li revenis por danki la patrinon por ĉio bona, bela kaj kara. La patrino diris malĝoje: “Se nur via restado estis plaĉa al vi, mi estas tre kontenta; kaj mi multe dankas vin, ke vi venis al mi el malproksima lando por viziti min”.

Peter ne povis dormi. Li sentis angoron. La patrinon li aŭdis mastrumi en la kuirejo, ĉar ŝi ankoraŭ bakis kukon por li, kvankam li provis diri al ŝi, ke ŝi baku nenion. Sed li vidis, ke estas ŝia deziro fari ĉion ĝojigan por li kaj tial li silentis. Nun li meditis kaj li eĉ trudis al si la malbonan penson, ke post la morgaŭa adiaŭo li ree estos libera kaj povos bonhumore vivi en lia kutima argentina medio. Denove li aŭtomobilo kun Manuela. Sed ĉio-ĉi nek ĝojigis lin, nek malpezigis la premon en lia koro. Prefere li ellitiĝus kaj karesus la karajn manojn de la patrino. Ŝi ja nur bakis en la nokto, por ke ŝi povu dediĉi sin tute al li dum la lastaj taghoroj.

Kelkfoje li estis aŭdinta la mal-laŭtigitan klakon de vazaro, sed nun

ĉio silentis. Jen subite preskaŭ neaŭdebla alpaŝo en lia ĉambro. Kvankam liaj okuloj estis fermitaj, li instinkte sentis ke lia patrino venis por adiaŭi la siaopinie dormantan filon. Nun ŝi estis ĉe li. Milde tuŝis ŝia mano lian kapon kaj karesis lian vangon. Peter ne kuraĝis spiri kaj jen la patrino jam mallaŭte eliris. Denove li aŭdis iomete vazaran klakadon.

Post iom da tempo Peter singarde ellitiĝis kaj tra fendo de duon-malfermita pordo li vidis sian patrinon. Ŝi preĝis. Peter reenlitiĝis kaj enpensiĝis. En la kuirejo daŭris la vazaraj klaketoj. Li sentis akran animan doloron. La lacega panjo certe per lasta forto penas por li. Kiom senfine grandeca estas la amo de la patrino, kaj kiom malmulte li atentis kaj dankis ŝin! Subite, kvazaŭ fulmo, heligis ekpenso lian meditadon, kaj sammomente li sciis, ke li efektivigos ĝin. Li restos hejme! Sinjoro Rodriguez ankaŭ sola povas estri la magazenon. Kun Manuela li povos amike korespondadi. Iel li trovos solvon pri la negocaj aferoj, sed tio nun ne estis grava. Li restados ĉe sia panjo, kaj tuj li ellitiĝis por diri tion al ŝi. Enirante en la kuirejon li vidis ŝin, sidantan, kun klinita kapo. "Patrino", li vokis mallaŭte. Ŝi ne respondis. Terura ekpenso ektimigis lin. Ĉu li venis tro malfrue? "Ne!", li vekriis. Jen la patrino levis la kapon kaj mirigite rigardis lin. Ŝi nur iom estis ekdorminta. Peter surgenuie malleviĝis kaj metis la vizaĝon sur la sinon de la patrino.

"Mi restos ĉiam ĉe vi, kara patrino. Neniam plu mi foriros; kaj nun iru dormi. Morgaŭ ni kune povos baki—ni havos nun multe da tempo", li flustris.

Li vidis la feliĉan esprimon en la vizaĝo de sia panjo. Samtempe li sentis la malpeziĝon de sia koro kaj li ĝojegis.

* * *

La preĝejaj sonoriloj anoncis la dimanĉon. Sur la antaŭdoma benko sidis Peter kun sia patrino kaj la malgranda Lisa. Ankaŭ la knabineto ĝojis, ke Peter restos ĉe ili. Peter rigardis gaje al la montego Săntis, kies konataj konturoj jam salutis lin ekde la unuaj jaroj de sia infaneco. Li nun konsciis, ke la vera feliĉo ne estas en riĉeco, plezuro aŭ senzorgeco, sed estas la sento de bona ago. Li retrovis sian hejmon kaj li estis tute feliĉa pri tio. Li restados en sia belega svisa patrujo kaj estis konvinkita, ke iel ĉi tie li perlaboros sian vivon same bone, kiel en fremdlando, kiu antaŭ 20 jaroj allogis lin.

Tri feliĉaj homoj rigardis sin reciproke, kaj ŝajnis al Peter kvazaŭ la unuan fojon post multaj jaroj ree estas dimanĉo en lia vivo.

Enigma konkurso : de paĝo 56

36-71-57-75-14-45-89-17=deklinacia kazo; 74-22-27-61-65-8-102-67-96-16-2=kuracilo; 53-37-62-29-44-42-79-33-19=povanta okazi; 46-9-64-83-51-98-41-23=konsistiga kaj simpla; 10-32-99-34-85-59-80-88=ornama skulptaĵo ĉe supera parto de kolono; 20-18-93-101-26-14-95=aĉetanto; 5-69-56-1-16-49-60-70-30=vidaĵo kiu altiras atenton; 72-97-50-28-63-39-11-35-103=gento de lacertoidoj kun kolorŝanĝema haŭto; 31-22-66-77-81-82=globeto entenanta gason; 48-86-94-28-47-4-92-25=speco de krispa brasiko; 12-6-40-44-78-72-95=emo kredi je misteraj efikoj; 68-32-76-38-54-45-52-87-88=metiisto ĉe domkonstruo.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 257

2-an de Januaro 1954

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de 1953, kaj ankaŭ, por komparo, je la fino de 1952 :

	1952	1953
Asociaj membroj	10447	11085
Individuaj membroj :		
MJ	1056	920
MA	3820	3915
MS	526	611
Patronoj ..	10	6
DM	268	266
HM	58	58
	5738	5776
	16185	16861

JARLIBRO. La jarlibro estas nun presata kaj espereble eliros en la fino de Januaro.

NOVAJ DUMVIVAJ MEMBROJ

Vasconcelos, F-ino E. de, São Paulo
Brazilo
van Ingen, S-ro A. C., Amsterdam,
Nederlando

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1954

141. Geerinck, S-ro R., St. Niklaas, Belgujo
142. Lamberts, S-ro V., Bruxelles, Belgujo
143. Vanmeerbeek, S-ro A., Tirlemont, Belgujo
144. Larsen, S-ro E., Fredericia, Danlando
145. Tobusch, S-ro H., Chicago, Ill., Usono
146. Wanderer, S-ro K., Tailfingen, Germanujo
147. Grundhoff, S-ro J., Wuppertal, Germanujo
148. Ley, S-ro W. von der, Tailfingen, Germanujo
149. Sandrock, S-ro O., Essen, Germanujo
150. Schmidt, S-ro K., Hamburg, Germanujo
151. Stoffers, S-ro R., Bremerhaven, Germanujo
152. Vogel, S-ino M., Stuttgart, Germanujo
153. Brown, S-ro G. E., Calgary, Kanado
154. Böcker, S-ro H., Gelsenkirchen, Germanujo
155. Teltz, S-ro F., Gelsenkirchen, Germanujo
156. Couwenberg, S-ro F., Blankenberge, Belgujo

157. Meeus, S-ro C. S., Antwerpen, Belgujo
158. Mooij, S-ro P. H., Brussel, Belgujo
159. Roose, S-ro F., Brugge, Belgujo
160. Gindertaelen, D-ro T.v., Mechelen, Belgujo
161. Fried, F-ino L., København, Danlando
162. Mertner, S-ro E. V., Engesvang, Danlando
163. Nielsen, S-ro B., Kolding, Danlando
164. Norlyk, S-ro M., Fredericia, Danlando
165. Trier, S-ro B. S., Haslev, Danlando
166. Beliard, S-ro L., Nantes, Francujo
167. Herlemont, S-ro H., Issy-les-Moulineaux, Francujo
168. Bernard, S-ro R., Bois-Colombes, Francujo
169. Guillaume, S-ro J., Le Vesinet, Francujo
170. Luez, S-ro D., Laon, Francujo
171. Prud'hon, S-ro G., Fontenay-s/Bois, Francujo
172. Thomassin, Abato P. de, Issy-les-Moulineaux, Francujo
173. Vautrin, S-ro J., Paris, Francujo
174. Petrović, S-ro S. V., Sjenica, Jugoslavujo
175. Salberg, S-ro E. E., Selce, Jugoslavujo
176. Kleynen, S-ro G. A. M., Rotterdam, Nederlando
177. Bloemendal, F-ino S. W., Lochem, Nederlando
178. Delden, S-ro P.v., Deventer, Nederlando
179. Douma, F-ino J. S., Deventer, Nederlando
180. Geerlings-la-Croix, S-ino M., Amsterdam, Nederlando
181. Ouwehand, S-ro D., Den Haag, Nederlando
182. Roelofs, D-ro W. P., Soest, Nederlando
183. Slijper, S-ro C. F. W., Utrecht, Nederlando
184. Waard, S-ro M. de, Capelle a.d. IJssel, Nederlando
185. Hattemer, S-ro H., Solothurn, Svislando
186. Humberset, S-ro J. P., Neuchâtel, Svislando
187. Rehmann, S-ino A., Genève, Svislando
188. Turner, S-ro G. P., Middleton, Wis., Usono
189. Nii, S-ino A., Toronto, Kanado

190. Charlet, F-ino J., Sain Bel, Francujo
191. Dedieu, F-ino J., Toulouse, Francujo
192. Odent, S-ro G., Charleville, Francujo
193. Perra, F-ino J., Sain Bel, Francujo
194. Dodge, S-ro E. G., Washington, D.C.,
Usono
195. Thierstein, S-ro K., Zürich, Svislando
196. Zimmermann, S-ro O. E., Zürich,
Svislando
197. Näslund, S-ino E., Uppsala, Svedujo
198. Ahlin, S-ro E. V., Brovallen, Svedujo
199. Almèn, S-ro P., Hällefors, Svedujo
200. Fejde, S-ro M., Nässjö, Svedujo
201. Holmström, S-ro A., Silverhöjden,
Svedujo
202. Jacobsson, S-ro J., Kilforsen, Svedujo
203. Linnander, F-ino S., Stockholm, Svedujo
204. Allen-Smith, S-ro H. W., Watford,
Anglujo
205. Bevan, S-ro F. O., Farnborough,
Anglujo
206. Boatman, S-ro D. P., Westcliff-on-Sea,
Anglujo
207. Boulton, F-ino M., Burlsem, Anglujo
208. Dunbar, S-ro R., London, Anglujo
209. Elderkin, S-ro T., Reading, Anglujo
210. Gardner, S-ro C. W., Sheffield, Anglujo
211. Larking, S-ro S. H., London, Anglujo
212. Murray, S-ro R., Thorpe Bay, Anglujo
213. Phelan, S-ro H. K., London, Anglujo
214. Riding, F-ino E., Herne Bay, Anglujo
215. Robson, S-ro B., Cheam, Anglujo
216. Roome, S-ro G. W., Sheffield, Anglujo
217. Saunders, S-ino A. J., Ventnor, Anglujo
218. Seddon, S-ino R., Southport, Anglujo
219. Sproxton, S-ro R. A., Tollerton,
Anglujo
220. Stone-Fry, S-ro G., London, Anglujo
221. Visser, S-ro N., London, Anglujo
222. Sayers, S-ino E. T., Brooklyn, N.Y.,
Usono
223. Sayers, S-ro J. D., Brooklyn, N.Y.,
Usono
224. Vugrinec, S-ro Z., Slav. Pozega,
Jugoslavujo
225. Drost, S-ro J. F., Steenwijk, Neder-
lando
226. Mook, S-ro W. H., Groningen, Neder-
lando
227. Nogué, S-ro J., Parets del Valles,
Hispanujo
228. Alberich-Jofre, S-ro S., Barcelona,
Hispanujo
229. Berghaenel, S-ro C., Barcelona,
Hispanujo
230. Fritzsching, S-ro K., New Delhi,
Hindujo
231. Apcher, S-ino G., Meknès, Maroko
232. Cellier, S-ro P., Meknès, Maroko
233. Krippner, S-ro W., Erfoud, Maroko
234. Forté, S-ro A., Jerada, Maroko
235. Delor, S-ro J., Gaillard, Francujo
236. Trésorier, S-ino J., Liesle, Francujo
237. Kempeneers, D-ro P., Bruxelles,
Belgujo
238. Staes, S-ino F., Bruxelles, Belgujo
239. Arton, S-ro A., Vollsjö, Svedujo
240. Englund, S-ro B., Solna, Svedujo
241. Ericson, S-ro A., Sköldinge, Svedujo
242. Karlsson, S-ro E., Vilshult, Svedujo
243. Bengtsson, S-ro E., Hälsingborg,
Svedujo
245. Blomgren, S-ro B., Hälsingborg,
Svedujo
246. Johansson, S-ro B., Hälsingborg,
Svedujo
247. Adolfsson, F-ino B., Hälsingborg,
Svedujo
248. Assarsson, F-ino A., Hälsingborg,
Svedujo
249. Carlsson, S-ro M., Kulladal, Svedujo
250. Gustafson, S-ro N., Hällabrottet,
Svedujo
251. Johansson, F-ino A., Hälsingborg,
Svedujo
252. Johansson, S-ro V. A., Göteborg,
Svedujo
253. Lundgren, S-ro A., Hälsingborg,
Svedujo
254. Persson, S-ro G., Hälsingborg, Svedujo
255. Persson, S-ro L., Häradsbygden,
Svedujo
256. Pettersson, S-ro F., Huvudsta, Svedujo
257. Bernaerts, F-ino A., Lier, Belgujo
258. Debrouwere, S-ro G., Kortrijk, Belgujo
259. Degryse, S-ro A., Roeselare, Belgujo
260. Impanis, F-ino M. R., Brussel, Belgujo
261. Clarkson, S-ro R. J., Tauranga, Nov-
zelando
262. Harms, S-ro H. J., 's-Gravenhage,
Nederlando
263. Bijmolt-Ochtman, S-ino C.,
Amsterdam, Nederlando
264. Bink, F-ino A. B. M., Rotterdam,
Nederlando
265. Mabesoone, S-ro P. M., Amsterdam,
Nederlando
266. Noordhoff, F-ino D., Laren, Neder-
lando
267. Pannenburg, S-ro R., Nieuwe-Pekela,
Nederlando
268. Postma, F-ino T., Rotterdam, Neder-
lando
269. Kjönigsen, S-ro R., Sarpsborg,
Norvegujo
270. Norvall, S-ro K., Oslo, Norvegujo
271. Eriksen, S-ino A., Bergen, Norvegujo

272. Ringstad, S-ro G., Frederikstad, Norvegujo
 273. Selbekk, S-ro J., Oslo, Norvegujo
 274. Stjernesund, S-ro E., Lilleström, Norvegujo
 275. Støp-Bowitz, S-ro C., Oslo, Norvegujo
 276. Tveit, S-ro M., Trondheim, Norvegujo
 277. Hickey, S-ro C., Annandale, Aŭstralio
 278. Appleby, S-ino C. I., Nottingham, Anglujo
 279. Birch, S-ro C. T. J., Norwich, Anglujo
 280. Chinn, S-ro C. G., Welwyn Garden City, Anglujo
 281. Flugel, Prof. J. C., London, Anglujo
 282. French, S-ro R. J., Bexley, Anglujo
 283. Hanson, S-ro C. G., Exeter, Anglujo
 284. Middlemast, S-ro A. H., Glasgow, Skotlando
 285. Mills, F-ino C., Manchester, Anglujo
 286. Pearson, F-ino E. M., York, Anglujo
 287. Skeen, F-ino M., Bournemouth, Anglujo
 288. Turton, S-ro G. H. A., Huddersfield, Anglujo
 289. Houghton, S-ro C. M., Welwyn Garden City, Anglujo
 290. Hansen, S-ro E., København, Danlando
 291. Lange, S-ro O. C., København, Danlando
 292. Møller, S-ro P., Viborg, Danlando
 293. Futran, S-ro J., New York, Usono

DONACOJ al la Ĝenerala Kaso : M. H. Davis 5ŝ., F-ino J. M. F. Marshall 2ŝ. 6p., F-ino E. M. Robertson 7ŝ. 6p., S-ino L. A. Evans 4ŝ., D. B., Gregor 7ŝ. 6p., S-ino A. Browne 7ŝ. 6p., G. Alvaredo Herrera 45ŝ., W. McCallum 10ŝ., C. N. Ayres 7ŝ., H. Tobusch 7ŝ., W. Krippner 5ŝ., I. T. Maddern 4ŝ.

DONACOJ al la Fondaĵo Montevideo : D-ro F. J. Williams 20ŝ., B. R. Zeiner 9ŝ., Klubo Esperantista Oslo 50ŝ., "Nelson" £5, Edinburgh Esp. Soc. £10, W. Flick 10ŝ., Hexhamanoj 20ŝ., A. Blid 6ŝ., M. Lewin 53ŝ. 6p., W. A. Walker 10ŝ., D. R. T. Jones 20ŝ., S-ino J. Bolland 2ŝ. 6p., S-ino H. Gscheidel-Pauli 25ŝ., F. Helfers 60ŝ., F. Lowitzer 3ŝ. 6p., G. A. M. Kleynen 4ŝ. 6p., C. Nelson 4ŝ. 6p., F-ino J. S. Douma 13ŝ., S-ino Kowmen 4ŝ. 6p., F-ino D. Noordhof 6ŝ. 6p., J. de Vrieze 18ŝ. 6p., F-ino T. P. Termaat 4ŝ. 6p., S-ino A. Meurrens 7ŝ., Esp. Soc. Milano £5, G. S. Boscarino 45ŝ. 8p., E. Aprosio 5ŝ., Reĝa Bruĝa Grupo Esp. 71ŝ., Esp. Brusela Grupo 50ŝ., F. Couwenberg 14ŝ., G. Debrouwere 14ŝ., E. P. Deruyver 7ŝ., G. Martens 7ŝ., F.

Volders 7ŝ., F-ino R. Pedersen 10ŝ., M. Lopes do Rego 7ŝ., F-ino M. E. Vieira Caetano 10ŝ., Esp. Grupo Gelsenkirchen-Buer 40ŝ., F-ino J. Dedieu 20ŝ., F-ino A. Romand 10ŝ., M. Fabert 20ŝ., J. Delor 9ŝ., L. Pauvrehomme 20ŝ., L. Minnaja 40ŝ.

Sumo ĝis 31.12.53 £238 2ŝ. 6d.

Sinceran dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH *Sekretario.*

Universala Esperanto-Asocio

Serva Centro

Palais Wilson, Genève, Svislando

Biblioteko de UEA. Jam antaŭ la milito la bibliotekisto de UEA intencis modernigi la katalogon de la Biblioteko (sliparo). La laboro konsistas el maŝinskriba kopiado de la sliparo farebla ekster la Serva Centro. Personoj pretaj kunhelpi je tiu ĉi laboro, disponanta je skribmaŝino estas petataj sin anonci je la supra adreso. Pliaj informoj skribe.

Enciklopedio de Esperanto. Spite nefavorajn kondiĉojn, la laboro pri la dua eldono de tiu ĉi verko daŭras. Personoj kiuj deziras komuniki ion, sendu informojn al la Redaktoro ĉe supra adreso. Post nelonge eliros cirkulero al la Landaj Asocioj kaj al ceteraj Esperantistaj organizaĵoj.

Ŝlosilaro de UEA. Estas havebla ĉe la Serva Centro de UEA ankoraŭ serio de dudek diverslingvaj ŝlosiloj de Esperanto. Prezo ok respond-kuponoj.

Turismaj presaĵoj. Iom post iom kolektiĝas nova materialo de turismaj presaĵoj. Interesuloj povas ricevi dekon da novaj gvidfolioj kontraŭ repago de la afranko, t.e. tri respond-kuponoj.

ANONCETOJ

Kosto : du pencoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkuponon por ĉiu duo da vortoj.
Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.
Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Ili glori la Eternulon por Lia boneco, kaj por Liaj mirakloj antaŭ la homidoj.

Ps. 107. 15.

Sendu kvanton da poŝtmarkoj kaj vi ricevos samkvanton de skandinavaj poŝtmarkoj. Sven Sundin, Lektorsvägen 4, VÄXJÖ, Svedujo.

Ne-katolikoj, kiuj deziras informojn pri la katolika religio, povas ricevi ilin senpage pere de la Sekretario de la Internacia Katolika Informejo, Fraterhuis, LOONOPZAND, Nederlando.

Japanaj kaj ĉinaj geinstruistoj, mi petas, sendu infanajn desegnaĵojn por japana kaj ĉina ekspozicio. Mi sendos reciprokan nombron el nia lando. Je ĉiu desegnaĵo notu nomon, sekson, kaj aĝon de la infano kaj lernogradon. Antonin Rauwolf, instruisto, MI. BOLESLAV II/672, Ĉeĥoslovakujo.

Internacia Kultura Semajno, 16-23 Julio 1954, en franca Esperanto-Domo, Grésillon. Informas detale kontraŭ internacia respondkuponon S-ro G. Odent, Lycée Chanzy, CHARLEVILLE (Ardenes), Francujo. Karavano al Haarlem aranĝota fine de la monato.

Ringwood Grammar School (fondita en 1577), West Hill Road, BOURNEMOUTH, Anglujo, bonvenigas knabojn el Britujo kaj aliaj landoj por eduko cele al Ĝenerala Eduka Atesto aŭ por libertempoj.

S-ro Eino Loorits el Tallin, Estonio, kiu dum 1938-9 gvidis laŭ Ĉe-metodo Esperanto-kursojn en Levanpelto kaj Kokemäki, Finnlando, fariĝis senhejma rifuĝinto kaj elmigris en 1949 el Germanujo al Aŭstralio. Li loĝas nun en sia propra domo kun sia edzino ĉe 203 Harrington Str., HOBART, Tasmanio, Aŭstralio.

S-ro Vicente Garcia, Valle 9, TERRASSA (Barcelona), Hispanujo deziras korespondi kun Azio, Afriko, Ameriko kaj Oceanio. Ĉiam, ĉien, ĉiel kaj ĉial tuj respondos. Tiu ĉi anonco validas dum unu jaro.

Internacia Esperanto-Ekspozicio okazos en Julio 1954 dum la Hispana Kongreso. Bonvolu sendi Esperantaĵojn al "Fratego", Santa Isabel 10, ZARAGOZA, Hispanujo, kun la indiko "Por la Ekspozicio".

Dudekjara studento de scienco deziras korespondi pri iuj dezirataj temoj kun geamikoj, kies hejma lingvo ne estas la angla. S-ro B. J. Robson, 14 Wickham Avenue, CHEAM, Surrey, Anglujo.

Kelkaj geinstruistoj (kaj aliaj) deziras interŝanĝe gastigi dum junio-aŭgusto ali-landajn samideanojn. Adresu : Ĉefdelegito, SOMERO, Finnlando.

Mi deziras interŝanĝi pk. kaj pm. tutmonde. Certe respondos. José A. Oyarzabal, Paseo del Campo Volantin 12, BILBAO, Hispanujo.

Letervesperon organizas en Marto sekcio **Hoogezand**, Nederlando. Ni petas multajn leterojn kaj aliajn poŝtaĵojn. Adreso : M. Abbas, B.C.-Strato 60, SAPPEMEER, Nederlando.

Poŝtmarkojn uzitajn deziras interŝanĝi kun ĉiuj landoj Sinjoro Champonnois, 10 rue Abbé Grégoire, ISSY-les-MOULINEAUX (Seine), Francujo.

Gelernantoj ŝatus korespondi kun tutmondaj gesamideanoj letere aŭ poŝtkarte. Por informoj skribu al S-ro G. H. Boyes, 6 South View, Fulwell, SUNDERLAND, Co. Durham, Anglujo.

Ĉu vi ŝatas infan-pentraĵojn? Nia art-seminario decidis uzi Esperanton por kolekti ekspozicion de infana arto el pluraj landoj. Ĉiu kunlaboranto ricevos laŭvice la ekspozicion. Ni serĉas unu kunlaboranton en ĉiu lando, kiu klopodos sendi al ni sortimenton da tipaj infanverkoj (desegnoj, pentraĵoj, dekoracioj, k.t.p.) el sia lando aŭ regiono. Skribu al Reto Rossetti, lektoro, Art Teacher Training College, 26 Priory Road, BIRMINGHAM 5, Anglujo.

Nederlandino 44-jara kaj 11-jara knabo deziras korespondi per leteroj kaj poŝtkartoj ilustritaj. F-ino L. Weijer, Reehorsterweg 36, EDE, Nederlando.

La Esperanto-Grupo en Nice bezonas por sia propagando amason da salutleteroj okaze de la malfermo de sia sidejo. Adreso : 25 rue Rossini, NICE, A.Mmes, Francujo.

S-ro Edward Kalmar, antaŭe en Svedujo, nun loĝas ĉe 4357½ Burns Avenue, LOS ANGELES 29, California, Usono.

BONVENA DONACO

je Kristnasko je datreveno
kiel dankesprimio

MORTO DE TRAJNO

de Freeman Wills Crofts

(fama angla verkisto de
detektivaj romanoj)

tradukita de Mason Stuttard

Tole bindita, kun plurkolora polvŝirmilo
256 paĝoj 9 ŝil., afranko 6p.

Eldonita de

ESPERANTO PUBLISHING Co. Ltd.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO,
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

**S SVEDA
S SOMERA
S SEMAJNO**

FROSTAVALLEN, Svedujo

8-15 aŭg. 1954

Kulture altnivela prelegsemaĵo
en tre bela regiono

Prelegos :

Prof. Ivo Lapenna, Jugoslavujo

Docento S. Pragano, Nederlando

D-ro F. Szilágyi, Svedujo

Distraĵoj, ekskursoj. Limigita nombro.

Informojn petu ĉe :

S-ro Jan Strönné, Amiralsgatan 36,
MALMÖ, Svedujo.

SVEDA ESPERANTO-INSTITUTO

Tri monumentoj de la mondliteraturo

varme rekomendataj de la tuta Esperanta gazetaro pro la lingva
perfekteco :

La Libro de la Spiritoj, de Allan Kardec, trad. de Porto Carreiro Neto.

Enhavanta 1018 demandojn kun detalaj respondoj pri ĉiuj
problemoj de la homa vivo antaŭ kaj post la morto.

1 vol. 532-paĝa, bonega papero, broŝ. 10ŝ. 6p., afranko 9p.

La Evangelio laŭ Spiritismo, de Allan Kardec, trad. de I. G. Braga.

Ĝi estas la plej klara eksplikado de la kristana religio el vidpunkto
spiritisma.

1 vol. 432-paĝa, broŝ. 8ŝ. 6p., afranko 8p.

Antaŭ du mil jaroj . . . de F. C. Xavier, trad. de Porto Carreiro Neto.

Historia romano pri la naskiĝo de Kristanismo kaj la Roma
politiko de la 1-a jarcento de nia epoko.

1 vol. 400-paĝa, broŝ. 15ŝ., afranko 6p.

Mendu ĉe

Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth,
Herts., Anglujo